

1983 novembro

76a jaro


n-ro 935 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

# esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)  
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



## Kanado unuafoje atendas UK



# Vi trovos,

ke iom-post-iam (aŭ iam-post-iam) venas ankaŭ novaj numeroj de ĉi tiu revuo. Eĉ ni mem komencas kredi, ke la tuta ĉi-jara kolekto aperos antaŭ la jarfino. Ni esperas, ke vi ĉi-numere ne trovos negativan foton, kiel okazis al vi en la oktobra numero (paĝo 169). Sciuj, ke tie ne temis pri ia kaŝita ludo, kiun vi ne kaptis, sed pri simpla teknika fuŝo. Kulpis kompreneble la redaktoro, kiu forvojaĝis al alia kontinento antaŭ ol fini la numeron. Tiu vojaĝo sentiĝas ankaŭ en ĉi tiu numero, kie pluraj tekstoj restis tro longaj, pro la fakto, ke la redaktoro rifuzis vagi tra la mondo sen sia tradicie akra tondilo. Nu, ni uzos ĝin en la postaj numeroj. Ne timu, tamen. Kaj, antaŭdankon por iom da tondmaterialo!

## Enhavo

- 181 Movado: Laborplano de UEA por la periodo 1983-1987
- 182 Eksteraj rilatoj: Interparoloj en Tunizio (Renato Corsetti)
- 183 Akademio de Esperanto: La Akademio fronte al la Centjara Jubileo (André Albault)
- 185 Esploro kaj dokumentado: Novaj planoj por CED (Geoffrey Sutton)
- 186 Landa agado: Modela laboro en Aŭstralio (Ralph Harry)
- 187 Esperanto kaj nealiancaj landoj: Esperanto diskutita en Pnompeno (Tibor Sekelj)
- 188 Reagoj: Ĉu konvenus skandinavia modelo? (Bertil Nilsson); Iniciato el Hispanio (G. Sutton)
- 189 Enketo pri la 69a UK: Kion opinias pri la budapeŝta UK la kongresanoj? (D. Masterman)
- 190 Recenzoj: *Esperanto aŭtodidakte* de A. Childs-Mee (M. Duc Goninaz); *Por multoble plivastigi nian movadon...* kaj *Facilaj dialogoj* de A. Lienhardt (G. Berveling); *Jazyk Esperanto* de M.I. Isajev (D. Blanke); *Unu tago post la alia* de C. Conterno (A. Brennan); *Verkoj de Verda Majo* de T. Hasegawa (K. Schubert); *Liberté ou autorité...* de F. Lo Jacomo (B. Kolker); *La lingva esenco de Esperanto* de A.D. Atanasov (W. Auld)
- 194 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 196 Nekrologoj (H.W. Allen-Smith, H. Barks, A. Berka, G. Billet, G. Carassa, J. Dumas, E. Edmondson, H. Finalsson, C. Hueber, G. Jobba, N. Knežević, R. Konstantinova, L. Křivánek, J. Molnár, P. Puvrez, J. Roattino, R.E. Ward, W. Wingen, N. Wooding)
- 197 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 199 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 200 Anoncetoj.

## La kovrilo

"Se aliaj landoj havas tro da historio, ni havas tro da geografio." Tion foje asertis fama kanadano. Prave, cetere, ĉar eĉ nuntempe, kiam la tuta mondo frontas la inkubon de la ekologiaj problemoj, la vasto de Kanado proponas al la vizitanto tutan gamon da unikaj pejzaĝoj, kie apenaŭ sentiĝas homa mano. La kovrila foto (ni ŝuldas ĝin al la provinca registaro de Brita Kolumbio) montras vidaĵon de okcidenta Vankuvero, kiu en 1984 gastigos la 69an Universalan Kongreson, pri kiu vi legos multajn detalojn en nia venonta numero.

## esperanto

**Oficiala organo** de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
**Telefona:** (010) 36 15 39.

**Aperas** monate (escepte de aŭgusto).  
**Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

**Redaktoro:** Simo Milojević.

**Abonprezo** varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

**Anonctarifo (gld.):** 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvirlaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

**Banko:** Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

**Ned. poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

**Telegramadreso:**  
ESPERANTO ROTTERDAM.

## Estraro de UEA

**Prezidanto** (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

**Vicprezidanto** (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

**Vicprezidanto** (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

**Ĝenerala sekretario:** d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

**Estrarano** (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

**Estrarano** (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 30 bvd. de Strasbourg, F-94130 Nogent sur Marne, Francio; ☎ (1) 873 18 27.

**Estrarano** (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

**Estrarano** (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

**Estrarano** (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.



# Laborplano de UEA por la periodo 1983-1987

*En siaj kunsidoj dum la 68a UK, la Komitato de UEA aprobis la ĉi-suban laborplanon por la periodo 1983-1987. Tiu decido signis nur provizoran finon de ampleksa debato, kiu tra la tuta pasinta oficperiodo okazis, ne nur en la Komisiono pri Planado kaj en la Komitato mem, sed ankaŭ en la Estraro kaj pluraj aliaj pli larĝaj kaj specifaj forumoj, kia estis, ekzemple, la Seminario pri Planado (en Bad Saarow, Germana DR) en novembro 1981. La rimarkinda koncizeco de la ĉi-sekva dokumento celas maksimuman superrigardeblon. Ĝi implicate rekonas la malsamecon de la cirkonstancoj en diversaj landoj kaj fakoj, kie oni kreu – surbaze de ĉi tiu dokumento – siajn proprajn, specifajn agadplanojn. Krome, per sia ĝeneraleco la ĉi-sekva dokumento antaŭsupozas daŭran reekzamenadon de la prioritatoj.*

**Prioritatoj:** La celoj de la ĉi-sekvaj gvidlinioj estas precipe la jenaj:

- altigi la nombron de la parolantoj de la Internacia Lingvo;
- altigi la kvaliton de la scioj de tiuj parolantoj;
- tutmondigi la Esperanto-movadon;
- utiligi Esperanton por ĉiuspecaj internaciaj rilatoj;
- trovi la ligojn inter Esperanto kaj la evoluo de la komunika teknologio.

Por atingi tiujn celojn, necesas fari paŝojn ankaŭ por:

- evoluigi la lingvon;
- fortigi la Movadon.

Tiuj agadoj estas esenca parto de la laboro de UEA, en kiu ĝi kunlaboru kun aliaj koncernataj instancoj.

**Rimarko:** La ĉi-sekva Laborplano prezentas kvar agadkampojn, al kiuj oni dediĉu atenton dum la periodo 1983-1987. Por ĉiu el la kvar agadkampoj la Laborplano prezentas liston de kvin prioritataj taskoj, laŭ ordo de prioritato (de la plej grava al la malplej grava). Tio ne signifas, ke la agadoj nemenciitaj ne estas gravaj aŭ daŭrigindaj. La Laborplano simple prezentas la agadojn, kiuj estas taksataj prioritataj en la pritraktata periodo, kaj kiuj devus enesti en ĉiuj laborplanoj de la landaj asocioj kaj aliaj por-Esperantaj instancoj.

## Tabelo de prioritatoj

### 1. INFORMADO

- 1.1. Komuniki informojn pri Esperanto kaj ĝia movado al la amaskomunikiloj, por ilia pluinformado al la ĝenerala publiko.
- 1.2. Informi la soci-politikajn mediojn pri Esperanto kaj ĝia movado.
- 1.3. Aliri pedagogiajn kaj edukajn instancojn kun informoj pri kontribuoj kaj ebloj de Esperanto por iliaj celoj.
- 1.4. Informi sciencajn kaj teknologiajn instancojn pri Esperanto.

- 1.5. Informi turismajn mediojn pri Esperanto.

### 2. EDUKADO KAJ INSTRUADO

- 2.1. Prizorgi la internan edukadon de niaj kunagantoj kaj doni al ili la informojn necesajn por pli efika agado.
- 2.2. Precizigi la konkretajn celojn de ĉiu aganta instanco, por ke ili estu klare enmetebaj en laborplanon kaj por ke oni kapablu konstante kontroli la gradon de atingo de la fiksitaj celoj. Eduki la aktivulojn agi laŭ fiksitaj celoj.
- 2.3. Precizigi la disponeblajn homajn rimedojn por agado kaj instruado kaj difini la relativan rolon de ĉiu laboranta instanco.
- 2.4. Difini la unuopajn informotajn cel-grupojn kaj rekonsideri la plej efikajn inform-manierojn.
- 2.5. Evoluigi novajn kaj pli efikajn instrumentojn kaj precizigi la celojn, kiujn oni volas atingi per instruado de la Lingvo Internacia.

### 3. APLIKADO

- 3.1. Uzi Esperanton en profesiaj rondoj. Evoluigi sciencan kaj fakan aplikadon de Esperanto.
- 3.2. Uzi Esperanton por fari aŭ helpi sociajn agadojn.
- 3.3. Uzi Esperanton por ebligi kulturajn interŝanĝojn internaciajn al esperantistoj kaj neesperantistoj.
- 3.4. Akceli la uzon de Esperanto en sporto kaj turismo.
- 3.5. Apliki Esperanton en aliaj kampoj, en kiuj prezentigas favoraj eblecoj.

### 4. ORGANIZAJ RIMEDOJ

- 4.1. Ordigi nian laborforton per sistemo de komisionoj kaj laborgrupoj sur ĉiuj agadniveletoj, por laborigi pli da esperantistoj.
- 4.2. Pliefikigi la delegitan reton.
- 4.3. Pliigi la oferton de turismaj servoj de la movado.
- 4.4. Aktivigi la Centron de Esploro kaj Dokumentado kaj la Bibliotekon Hodler de UEA por ke ili estu servokapablaj.
- 4.5. Pliigi la komercajn enspezojn de ĉiuj organizaĵoj de la Esperanto-movado.



# Interparoloj en Tunizio

Ĉu ekzistas arabaj elementoj en la gramatiko de Esperanto? Ĉu ekzistas malfacilaĵoj en la sonsistemo por arablingvanoj? Kiuj internaciaj arabaj radikoj estis prenitaj en Esperanton? Kion diris Mahometo pri intergentaj rilatoj? Kial Esperanto ĝis nun ne disvastiĝis en arablingvaj landoj? Kio estas la sinteno de la Esperanto-movado al la arabig-kampanjo, kiun ni faras ĉi tie?

Tio estas nur parto de granda aro da demandoj, kiuj lavangis sur la reprezentantojn de UEA – Renato Corsetti kaj Barbara Despiney – dum ilia kvartaga restado en Tunizio fine de septembro.

Dum tiuj kvar tagoj ni renkontis tutan gamon da respondeculoj de interarabaj kaj tuniziaj instancoj,

por egalaj (kontraŭkoloniismaj, se vi preferas pli teknikan difinon) internaciaj rilatoj kaj kiel ilo por helpi disvastigi la araban kulturon en internacia vesto tra la mondo. Fakte, malgraŭ sia pasinta grandiozeco, nun la araba kulturo en monda skalo troviĝas en iom minoritata pozicio.

La saman malfermitecon ni renkontis ĉe la kultura branĉo de Araba Ligo. Temas iusence pri la araba Unesko, kies nomo estas mallonge "ALECSO" aŭ, en sia plena formo, Araba Organizaĵo por Edukado, Scienco kaj Kulturo. Ni renkontis ties ĝeneralan direktoron kaj plurajn sekciestrojn. Tie maturiĝis la ideo pri komuna seminario en Tuniso en ilia sidejo, por deko da fakuloj el la Esperanto-movado kaj deko da fakuloj el la araba mondo, cele al reciproka kleriĝo pri la problemoj, naskiĝantaj el la renkontiĝo inter Esperanto kaj la araba "kontinento".

La saman pretecon informiĝi ni trovis ĉe ĉiuj respondeculoj de pluraj ministerioj, de la reganta partio

**Provo malkovri Esperanton al la araba mondo: M. Masmoudi sidas centre; dekstre de li videblas Corsetti kaj Despiney.**



kun kiuj ni priparolis iom exploreme la eblecojn de kunlaboro inter UEA, kaj pli ĝenerale la Esperanto-movado, kaj la araba mondo.

La vizito okazis pro invito kaj per la helpo de la eksa ambasadoro de Tunizio ĉe Unesko kaj nuna konsilanto pri komunikaj problemoj de la tunizia ĉefministro, s-ro Moustapha Masmoudi, bone konata al la legantoj de ĉi tiu revuo pro lia inaŭgura parolado dum la Universala Kongreso en Antverpeno (vd. revuon *Esperanto*, sept. 1982). La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj daŭre restis en kontakto, kio decidigis lin fari ion konkretan por Esperanto en la araba mondo.

Ĉu estis rezultoj sekve de tiuj interparoloj en Tunizio? Mi opinias, ke jes. Unuafoje UEA oficiale kontaktis la plej superan politikan instancon de la araba mondo, tio estas Araba Ligo, kiu montris grandan interesigon pri la potencialo de Esperanto kiel ilo

(la socialisma konstituciisma tunizia partio), de ĵurnaloj ktp.

Ne mankas kompreneble grandaj problemoj. La unua estas la absoluta ignoro flanke de nearaboj, kaj tiaj estas preskaŭ ni ĉiuj, pri la kultura klimato en arabaj landoj. La dua estas la neekzisto de arabaj esperantistoj, krom manpleno da sindediĉaj unuopuloj. La tria fontas el la aparta situacio de la arabaj landoj en la nuna tempo rilate al sia propra lingvo kaj kulturo. Temas pri stadio, en kiu ili forte klopodas doni al la araba ĉiujn funkciojn interne de la arabaj landoj mem kaj, se eble, internacian agnoskon en internaciaj instancoj.

Ĉu Esperanto iel kongruas kun iliaj nunaj interesoj? Mi opinias, ke kunlaboro eblas, kaj ke la Esperanto-movado povas multon doni al la araboj, same kiel la Esperanto-mondo povus multe profiti el araba komponanto en sia kulturo, kiu nun tute mankas.



Dum ĉi tiuj pintnivelaĵoj iniciatoj (seminarioj ks.) pluiros sian vojon, espereble sukcesan, restas antaŭ ni la granda tasko varbi esperantistojn en arabaj landoj. Tiun taskon nun alfrontos la Komisiono pri Landa Agado de UEA, por ke la du flankoj, oficialuloj kaj esperantistoj, iam renkontiĝu kaj ekrulu la ŝtonon de Esperanto en tiuj landoj.

Renato Corsetti

## AKADEMIO DE ESPERANTO

# La Akademio fronte al la Centjara Jubileo

”Simile al ĉiu alia lingvo Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo finita kaj netuŝebla” (*Kun grandaj paŝoj eksterlanden!*, eld. Ludovikito, 1979; p. 115). Per tiuj vortoj Zamenhof (jan. 1904) aliris la problemon de estonta akademio aŭ de lingva komitato. Unu jaron poste li precizigis: ”La komitato havas la rajton decidi nur pri punktoj *dubaj*, sed ne fari ian *ŝanĝon* en la lingvo” (*Klopodis organizi, sed vane!*, eld. Ludovikito, 1980; p. 64). Ankoraŭ hodiaŭ la statuto de la Akademio de Esperanto, kiu ”transprenis la celojn kaj la laborojn de la antaŭa Lingva Komitato”, asertas tion saman. Ĝia ”tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon” (art. 1).

Ni memorigu, ke *kontroli* signifas, laŭ PIV: ”detale esplori, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti”. Kaj la vortaro aldonas: ”*kontroli* neniam havas la anglan sencon: regi, direkti”. Jen gravega informo por ĝuste kompreni la statuton kaj la esencan taskon de la Akademio!

Cetere ja evidentas, ke, se la Akademio ial aŭ iel forgesus aŭ ignorus la sencon de *kontroli* kaj emus direkti la evoluon, do tiam la vivo rapide rekonsciigus ĝin pri ĝiaj devoj. La motoro de la evoluo estas la uzado de la plej granda nombro. La Akademio devas teni la bremsan por eviti devojigon aŭ akcidenton. Verkistoj beletraj, teknikaj aŭ sciencaj teorie havas – en iuj limoj – ĉiujn rajtojn; sed ili ja estas respondecaj pri siaj novismoj vortaj, esprimaj aŭ parolturnaj. Eĉ la prezidanto de la Akademio, kiel ĉiu individuo, rajtas esti verkisto; sed kiel prezidanto li respondece devas konscii pri la taskoj de la Akademio. Li toleras ĉion, kio fluas en la senco de la evoluo, sed severe malpermesas, kio estas kontraŭ la tradicio aŭ kontraŭ la verkoj de Zamenhof kaj precipe kaj ĉefe kontraŭ la Fundamento.

Por la publiko la Akademio estas nekonata, pli-malpli mistera! Necesas, ke ĝi informu pri sia agado, siaj decidoj, sia vivo. Por tio ĝi havas plurajn rime-



**Multaj planoj por pli aktiva rolo de la gvida lingva institucio: d-ro André Albault, prezidanto de la Akademio de Esperanto**

(Foto: A. Berthelemy)

dojn: ĝiaj internaj *Cirkuleroj*, kiuj ja ne estas sekretaj, sed prefere diskretaj. La statuto (art. 22) antaŭvidas la informilojn *Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto*, kiuj en formo de cirkuleroj estas sendataj al la akademianoj kaj al iuj gazetoj. Ĝi ankaŭ mencias (art. 23) la aperon de presitaj kajeroj kun la titolo *Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto*. La numeroj 9 kaj 10 de tiu bulteno aperis sub Waringhien kun la titolo *Aktoj de la Akademio, I kaj II*. Ni denove zorgu pri tiuj eldonaĵoj: mi proponas, ke *Aktoj III* entenu i.a. la rezulton de la enketo al la naciaj Esperanto-institutoj pri ekzamenoj (d-ro Bormann). Same ni devos apogi bonajn iniciatojn kun iom alia karaktero, kiel ekzemple la festlibro *Li kaj Ni*, omaĝa al prof. Waringhien. Ni citu ankaŭ la ĵus aperintajn *Akademiaj studoj*; malpli formalaj, sed pli rapid-aperaj, ili memorigas pri la studoj de la iama *Oficiala gazeto* (1906-1921).

Cetere por la Esperanto-publiko la Akademio devus havi taskojn, kiujn mi volonte karakterizus skeme kiel unuecigajn kaj pedagogiajn.

La taskoj de la Akademio efektiviĝas interne de la Sekcioj, kiuj studas ”la demandojn rilatajn al specialaj lingvaj fakoj” (art. 4). La kutimaj Sekcioj estas:



gramatiko, ĝenerala vortaro, teknikaj vortaroj, literaturo. Sed laŭ bezono estas kreeblaj aliaj; ekzemple bibliografio, prononcado. Pro la tutmonda ekspansio de nia lingvo ni pripensos, ĉu estas bone havi sekcion, kiu studus la okcidentecon kaj la orientecon de Esperanto. Pro la aĝo de nia institucio ni devus organizi la arkivojn kaj eldonigi kelkajn el ĝiaj elementoj sub jenaj ĉapitroj: oficialaj tekstoj, decidoj lingvaj, decidoj organizaj; raportoj de la sekciaj direktoroj; studoj de akademianoj; historio de la Lingva Komitato kaj de la posta Akademio. Ni devus ankaŭ inventari la diversepoke aperintajn verkojn de Zamenhof kaj prizorgi, ke ili estu haveblaj ĉe la diversaj eldonejoj; ili estas la bazo de nia unueco!

La taskoj de la Akademio ankaŭ konsistas el rilatoj kun eksteraj organizaĵoj, "kun fakaj komisionoj de specialistoj kaj kun naciaj Esperanto-Institutoj" (art. 17). Jam de kelka tempo d-ro Bormann laboras sur tiu kampo. Ni devos konsiderinde ampleksigi tiujn rilatojn: tio grandamezure etendos kaj konigos la kontroladon de la Akademio serve al nia lingvo; ĉekape de la naciaj Esperanto-institutoj kaj de ĉiuj ekzistantaj sanaj fortoj la Akademio pli facile defendos la lingvon kontraŭ ĉiaj atencoj de interne kaj atakoj de ekstere.

Tio ne elĉerpas la taskojn antaŭviditajn de la Statuto. Ekzemple, art. 11-A difinas korespondantojn de la Akademio. Kaj art. 12 aludas verkadon de diversaj vortaroj, la kontroladon kaj aprobadon de terminaroj verkitaj de aliaj aŭtoroj; la reviziadon kaj kritikadon de diversaj verkoj, la atribudadon de premioj al aŭtoroj; fine, la defendon de Esperanto kontraŭ konkurencaj sistemoj de internacia lingvo! Tio eble aspektos kiel iom eksa, nun kiam la angla invadas la mondon; sed ĝuste tion necesus primediti kaj pritrovi reagometodojn...

Kelkaj el tiuj taskoj, kiel oni povas konstati, ja neniam estis entreprenitaj. Tamen la Statuto devus esti pli fleksebla kaj devus allasi, ke iuj taskoj estu fareblaj de aliaj, dum la Akademio havus rolon precipe kontrolan, aproban, sankcian. Ekzemple, premioj proponitaj de verkista asocio estus sankciitaj de la Akademio; tiel same post laboro de kompetenta kaj rekonita scienca organismo la Akademio donus al terminaroj sian kontrolon kaj aprobon. El vidpunkto pure lingva la Akademio efektivigus kontroladon por verkoj, kiuj aliflanke prezentus ĉiujn garantiojn de valoro kaj kompetenteco, kaj ĝi elliverus ian "permeson", ian "rekomendon" kun formulo, kiu rapide iĝus tiel konata kiel la *Nihil obstat* de la Katolika Eklezio. Ĝi povus esti "nenio riproĉinda" aŭ "nenio kontraŭas" (la Fundamenton, nek la lingvon de Zamenhof kaj la bonaj aŭtoroj), aŭ simple "Aprobata de la Akademio", laŭ la iama "Aprobata de D-ro Zamenhof". Ni efektive atentis la deziron de niaj sciencaj kaj teknikaj terminologoj; deziro esprimita i.a. ĉe la



***Ne nur administri sed ankaŭ sproni al agado: d-ro W. Bormann, ĝenerala sekretario de la Akademio.***

Renkontiĝo en Bad Saarow; ili sopiras al stabiliĝo de la scienca lingvo kaj la Akademio helpu per ellivero de sankcio post rekoninda kaj akceptinda laboro.

Ĉiuj ĉi taskoj por esti bone kondukataj ĝis sia fino necesigos ne nur bonvolemajn fortojn sed ankaŭ seriozan fortigon de niaj financoj! La art. 20 antaŭvidas, ke UEA kaj aliaj organizaĵoj subvencios kaj ke esperantistoj donacos...: certe UEA povas fari multe pli ol doni almozon kiel ĝis nun! Nur du-tri aliaj asocioj donas de tempo al tempo...: certe la plimulto de la asocioj povus doni regule ĉiujare depende de sia riĉo kaj malavaro! Certe troviĝas esperantistoj, kiuj sufiĉe komprenas la celon kaj neceson de la Akademio por fari donacojn. Necesus ankaŭ modifi tiun artikolon 20 kaj akcepti subvenciojn ankaŭ de eksteraj internaciaj organizaĵoj kiel Unesko: eble oni nin elaŭdus en ĉi tiu Jaro de la Komunikado?

Cetere la Statuto devus esti modifita en pluraj punktoj. Devus ekzemple esti kreita iu elekto-komisiono, kiu organizus la elektojn kaj de la membroj, kaj de la estraro; sed ne de la sekciaj direktoroj; ĝi funkcius laŭ speciala regularo, kiu certigus harmonian evoluon. Pli ĝenerale, apud la Sekcioj difinitaj por la lingvaj laboroj devus esti starigitaj komisionoj por la aliaj laboroj, kiujn ni jam preparolis: elektoj, financoj, statuto, rilatoj kun sciencistoj, kun naciaj Esperanto-institutoj, kun eksteraj oficialaj organizaĵoj...

Jen kelkaj el la taskoj, kiuj estas konsidereblaj en la nunaj jaroj. Jen la taskoj al kiuj la Akademio povas doni sian kontribuon okaze de la Centjara Jubileo de la apero de Esperanto; serve al nia lingvo, al nia movado, al la Homaro.

**André Albault**



## Novaj planoj por CED

En la venonta laborperiodo la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) esperas esti pli aktiva ol en la lastaj jaroj. D-ino Barbara Despiney (Francio) elektigis al la Estraro de UEA kaj transprenis grandan parton de la devoj pri eksteraj rilatoj de d-ro Humphrey Tonkin. Tiel d-ro Tonkin povos dediĉi pli da atento al CED, kiel ankaŭ al rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko. Krome, al la cetera reelektita Estraro de CED la Komitato de UEA aldonis unu novan estraranon, s-ron Edward Symoens (Belgio).

En siaj kunvenoj en Budapeŝto la ĉeestantaj estraranoj de CED diskutis pri sciencaj konferencoj, kiuj povus interesi la Esperanto-movadon. Pri la tuta demando estonte okupiĝos s-ro Symoens. Li nun aparte respondecas pri kontaktoj kun la 6a Konferenco pri Aplika Lingvistiko, kiu okazos en Bruselo de la 5a ĝis la 10a de aŭgusto 1984. Per tio CED atentigas la gravan punkton en la Programo de UEA pri la Jubilea Jaro, kiu mencias "instigon al neesperantistaj

anto, jan. 1983). Por la 15a de decembro ĉi-jare CED planas similan konferencon, ĉi-foje pri "Lingva konduto en internaciaj organizaĵoj". S-ino Françoise Cestac, direktoro de la Traduka Servo de UN, jam konsentis partopreni la laboron kiel ano de la organiza komitato. Raporton pri la antaŭa konferenco oni planas publikigi post unu aŭ du monatoj.

La iaman revuon *Esperantologio* CED klopodas reaperigi, sed oni ankoraŭ ne trovis plene taŭgan procedmanieron. Tio levas la demandon, ĉu tia redakta laboro ne povus pli ligiĝi al la CO de UEA, kadre de ĝenerala plano por la estonta eldona aktivado de UEA.

*Esperanto-dokumentoj* nun jam aperas sub la ŝildo de UEA, sed kelkaj estraranoj esprimis la deziron, ke CED denove okupiĝu senpere pri ili. Lastatempe aperis anglalingva raporto pri la Jaro de Handikapitoj kaj du aliaj anglalingvaj raportoj estas en presprovaĵoj: unu pri Unesko kaj UEA dum la jaroj 1976-82 kaj unu pri la eduka valoro de la studo de Esperanto. Ĝus aperis *Lingvaj malhelpoj en rilato al la nova monda informa kaj komunika ordo*, la parolado de s-ro Masmoudi en la antverpena Universala Kongreso. Francilingva raporto pri Esperanto en ligo kun literatura tradukado estas en presprovaĵo, kaj franca

**D-ro Humphrey Tonkin parolas en la kongresa kun-sido pri esploroj kaj dokumentado en Budapeŝto**

(Foto: Zoltán Fejér)



fakaj organizoj, ke ili dediĉu apartan atenton al Esperanto en siaj konferencoj kaj kongresoj" (*Kiu faru kion*, p.17).

Alia jubilea programero estas tio, ke CED okupiĝu pri serio de konferencoj pri la internacilingva ideo en 1985, 1986 kaj 1987 (principe po unu konferenco en Azio, okcidenta kaj orienta Eŭropo), kiuj traktos la terenojn de la historiaj, sociaj kaj lingvaj aspektoj de Esperanto.

En decembro 1982 CED okazigis en Nov-Jorko tre sukcesan unutagan konferencon pri la Monda Komunikado Jaro kaj lingvolernado (vd. revuon *Esper-*

traduko de la broŝuro de Claude Piron *Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* estas survoje.

En Budapeŝto oni kritikis, ke *Esperanto-dokumentoj* aperas nur en Esperanto, la angla kaj la franca, sekve de kio CED nun aktive esploros aperigon de elektitaj dokumentoj ankaŭ en aliaj lingvoj.

CED jam antaŭe aperigis inform-riĉan "novaĵleteron" por interlingvistoj. Nun, nome de CED, Akademia Centro Interlingvistika en Pollando eldonos ĝin sub la nova nomo *Informilo por interlingvistoj*. La celo de la informilo restas la sama, nome liveri freŝajn informojn al fakuloj en kiel eble plej simpla formo.



Tiuj, kiuj deziras kunlabori por la informilo, skribu al d-ro Ryszard Rokicki, Kolorowa 9, PL-05-815 Opacz, Pollando.

La alia periodaĵo de CED estas *Language Problems and Language Planning*, kuneldonata de la Universitato de Teksaso. Lastatempe ĝi ricevis ne malmulte da kritiko pro sia preskaŭ ekskluziva uzo de la angla lingvo. Ankaŭ neklare en ĝi aperas mencio pri CED. Kvankam la redakta politiko estas tute alia kompare kun la tutmonda aliro kun principa egaleco inter la lingvoj de la kontribuoj, kiun karakterizis la redakta politiko de ĝia antaŭulo *La monda lingvo-problemo*, oni montris aprobon per reelektado de la redaktoro, d-ro Richard E. Wood, por plia trijara deĵorperiodo. La nova vicredaktoro estas prof. Frank H. Nuessel, Usono. Oni krome decidis starigi malgrandan Redakcian Komitaton kun la tasko helpi pri varbado de artikoloj precipe en lingvoj aliaj ol la angla kaj precipe pri principaj demandoj koncerne lingvo-planadon kaj lingvo-politikon. **gs**

## LANDA AGADO

# Modela laboro en Aŭstralio

Ĉiujare la Aŭstralia Nacia Komisiono por Unesko (kies prezidanto, universitata rektoro prof. Ronald Gates, nun estas patrono por la Centjara jubileo de Esperanto) invitas reprezentantojn de koncernataj ne-registaraj organizaĵoj kunveni por diskuti pri la programo de Unesko kaj konsili la registaron. Inter tiu kvardeko da organizaĵoj estas Aŭstralia Esperanto-Asocio.

La konsultado de 1983 okazis la 29an kaj 30an de julio en Sidnejo. S-ro Ralph Harry reprezentis AEA. Partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj kaj la Societo de Amikoj, ambaŭ anoj de la laborgrupo pri la Internacia Lingvo, starigita de AEA en junio (*Esperanto*, julio-aŭg. 1983), kaj la sekretario de la Societo por la Ruĝa Kruco kaj aliaj simpatiantoj.

Krome, reprezentanto de la Aŭstralia Asocio de Kamparaj Virinoj anoncis, ke ankaŭ la 70 000 membroj de ŝia asocio subtenas Esperanton.

AEA skribis proponis, ke la aŭstralia delegitaro al la Ĝenerala Konferenco de Unesko i.a. laboru por realigi kadron por vere internacia socio, favoru enmeton en la buĝeton de Unesko de specifa ero por helpi al Esperanto kiel interpersona komunikilo, stimuli eldonon de pli da bazaj tekstoj de Unesko en Esperanto, kuraĝigu tradukadon en Esperanton de literaturo de ŝtatoj-membroj kaj certigu, ke Unesko enme-

tos la Centjaran Jubileon de Esperanto en sian "Kalendaron de grandaj personoj kaj eventoj".

La Komisiono promesis konsideri ĉiujn sugestojn. Ĝi supozeble ne akceptos ĉiujn, tamen evidentis, ke la fakto, ke AEA nun parolas nome de grupo da organizaĵoj kun entuta membraro de ĉirkaŭ 80 000 multe fortigis ĝian voĉon.

**Ralph Harry**

## LINGVOPROBLEMO

# Konferenco pri plurlingveco

De la 27a ĝis la 31a de aŭgusto 1983 okazis en Bruselo Konferenco pri Plurlingveco, organizita de la Eŭropa Klubo kun la temo "Plurlingveco: Ĉu obstaklo aŭ ponto por Eŭropo?" La konferenco estis oficiale kvarlingva, sed Esperanto estis la ĉefe uzata lingvo.

Partoprenis ĉirkaŭ 70 personoj venintaj el sep el la dek ŝtatoj de la Eŭropa Komunumo, kaj krome el Jugoslavio kaj aliaj ŝtatoj.

Dank' al la abunda programo la konferencanoj povis viziti la Eŭropan Parlamenton, la sidejon de la Eŭropa Komisiono, la tradukservon de la Konsilio de la Eŭropa Komunumo kaj la sidejon de la Ekonomia kaj Socia Komitato de la Eŭropa Komunumo. Ekzistis la ebleco paroli kun anoj de la Eŭropa Parlamento, kun ĵurnalistoj kaj kun tradukistoj. Oni krome pasigis tagon en la universitata esplorcentro pri plurlingveco, kie oni diskutis pri la (fiaskanta) plurlingveco en Bruselo kiel modelo pri la plurlingveco de EK.

Elstaraj prelegantoj konigis siajn opiniojn pri komunikado en Eŭropo. En tri debatoj oni tuŝis aktualajn temojn (enkondukon de la Internacia Lingvo en la lernejojn, lingvajn minoritatojn, la eŭropajn elektojn en 1984). La Eŭropa Klubo mem havis eksterordinaran kunvenon, kiu akceptis statutŝanĝojn kaj pli malaltan kotizon, kaj krome ĝi laboris per studgrupoj (i.a. pri la Jubilea Jaro 1987).

Sed ankaŭ ne mankis la distraĵoj: ekskurso al Waterloo, vizito al la muzeo de natursciencoj, ĉeesto en koncerto de kariljon- kaj trumpetmuziko k.a.

La konferenco donis novan impulson al la vivo de la Eŭropa Klubo, pluraj membroj akiris novan entuziasmon kaj pluraj aliaj aliĝis. Ankaŭ ekstere oni nun pli bone scias pri ĝia agado. Okazis intervjuo en la novaĵelsendoj de la flandra televido, du radio-intervjuoj de Studio Brussel kaj pluraj tekstoj en belgaj gazetoj.

La Eŭropa Klubo nun estas pli bone preparita por granda kampanjo antaŭ la eŭropaj elektoj de junio 1984.



# Esperanto diskutita en Pnompeno

*La agado por proponi Esperanton al la Movado de Nealiancaj Landoj nun liveris sian unuan rezulton, dank' al la jugoslavaj delegitoj. Necesos ankoraŭ multe da celkonscia informado por antaŭenigi la proponon, al kiu ankaŭ ĉiuj landaj asocioj kaj lokaj Esperanto-societoj povos helpi – aparte tiuj en urboj, kie troviĝas registaro. La gravecon, kun kiu UEA traktas la aferon, montras tio, ke en Budapeŝto la Komitato aldone elektis komisionon, konsistantan el Zlatko Tišljarić, Nikola Rašić kaj Renato Corsetti, por povi ampleksigi la daŭrantan laboron de mag. Tibor Sekelj.*

Inter la 24a kaj 28a de septembro ĉi-jare en la ĉefurbo de Kampuĉeo, Pnompeno, okazis kunveno de ministroj pri kulturo de la Movado de Nealiancaj Landoj (MNL).

La temaro de la kunveno ĉefe koncernis la eblecojn de kunlaboro inter la nealiancaj landoj sur la kampo de kulturo, edukado, scienco kaj tekniko.

La delegitaro de Jugoslavio, konsistanta el Vinko Zrelec kaj Darinka Zimić (direktoro kaj vicdirektoro de la Federacia Instituto por Internacia Kunlaboro pri Kulturo, Scienco kaj Tekniko) faris proponon, kiu aparte interesas nin. Ĝi proponis rezolucion, laŭ kiu la kunveno rekomendu al ĉiuj nealiancaj landoj sti-

mulu aŭ intensigi la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto, por poste, en la sekva fazo, utiligi ĝin kiel interkomprenilon sur ĉiuj niveloj en la reciprokaj rilatoj.

La propono estis farita buŝe, sen skriba informo, kaj sen konvena antaŭpreparo de la propono, tiel ke por pluraj partoprenantoj la ideo estis nova. Ekestis vigla diskuto kun partopreno de pluraj ĉeestantoj, sed fine ili ne atingis konsenton pri la temo. La ĉefaj oponentoj estis kelkaj afrikaj reprezentantoj, kiuj insistis, ke iliaj plej gravaj problemoj nuntempe estas la lukto kontraŭ analfabeteco kaj la enkonduko de la etnaj lingvoj en la elementlernejan instruadon. Kaŭzo de tiu starpunkto estas la nesufiĉa informiteco pri la celoj kaj eblecoj de Esperanto. La tuta demando tamen ne estis nuligita, sed ĝi restas sen fina decido, do prokrastita por alia okazo.

Pro tio, la jugoslava delegitaro tute ne konsideras la proponon fiaskinta, sed kontraŭe, ĝi estas preta restarigi la demandon, kun pli bona antaŭpreparo, eble en nova formo, en estontaj okazoj, ĝis oni akceptos ĝin.

Feliĉe ĝuste tian starpunkton havas ankaŭ la Komisiono de UEA pri Kontaktoj kun MNL. Tiu propono, en kiu la unuan fojon aŭdiĝis la vorto Esperanto en kunveno de MNL, signifas la komencon de pli celkonscia, pli esperplena agado sur tiu laborkampo. Restas nia tasko doni fortan apogon al la jugoslava propono per vasta diskonigo de niaj ideoj inter la nealiancaj landoj kaj ties popoloj sur diversaj niveloj.

Kiel ni povas apogi la proponon? Jen kelkaj ideoj: *1. Informi la diplomatojn.* Klubo en la ĉefurboj havas apartan eblecon plenumi informan laboron inter ambasadoroj. Por tio estas bonega okazo la Zamenhofa Tago, kiel tion plenumis en Nov-Jorko CED kaj la UEA-oficejo por rilatoj kun UN (vd. *Esperanto*, januaro 1983, p. 6-7).

Por ke la kunveno havu krom festa ankaŭ informan karakteron, la loka esperantistaro kune kun la landa asocio, antaŭvidu laŭeble altnivelan programon, direktitan al la altranga ĉeestantaro, laŭ la enhavo kaj laŭ la lingvoj uzataj. Por instigi la ĉeeston de ambasadoroj aŭ iliaj anstataŭantoj, kiel ankaŭ de enlandaj aŭtoritatuloj pri lernejoj, kulturo, internaciaj rilatoj, lingvo-instruado, pacmovadoj k.a., estas konvene, ke kelk-persona, kompetenta delegitaro vizitu ilin ĉiujn.

Se momente la ĉefurba kaj la landa organizaĵo ne havas la eblon prepari altnivelan kunvenon, ankaŭ simpla informa vizito havas grandan valoron. Dum tia



**Esperantisto el Afriko (tio signifas ankaŭ el nealiancaj landoj) estas ankoraŭ movada raraĵo.**



kunveno la vizitantoj informu la ambasadoron aŭ kultur-ataŝeon, aŭ propralandan aŭtoritatulon pri la ĵusa iniciato en la sino de MNL, kaj pri la daŭrigo de tiu agado. Informu pri la nuna stato de la Movado kaj ĝiaj diversflankaj atingoj, kiel ankaŭ pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Oni ne forgesu peti la kompetentan opinion de la interparolanto. Samtempe oni postlasu iom da dokumentoj, kiel la Esperanto-dokumenton *La lingva problemo de la Movado de Nealiancaj Landoj – Kelkaj rekomendoj* (haveblan ankaŭ en la franca kaj angla), alian informan materialon, revuon, libron ks.

Tian informan laboron oni povas entrepreni ĉe diplomaciaj misioj de ĉiuj landoj, por ĝisdatigi la konojn pri la afero ĉe eĉ la plej bone informitaj. Tamen en la nuna momento estas aparte grava kontribuo ĉiu kontakto kun diplomatoj el la ĉirkaŭ cent nealiancaj landoj, grandparte el la "tria mondo".

La temo de Esperanto en MNL nun transiras al la kompetenteco de la Kunordiga Komisiono por kunlaboro sur la kampo de edukado kaj kulturo. Al tiu komisiono apartenas: Alĝerio, Angolo, Cipro, Kubo, Gvajano, Hinda Unio, Mozambiko, Nikaragvo, Panamo, Demokratia Popolrespubliko Koreio, Vjetnamio kaj Jugoslavio. Iliaj reprezentantoj ĉe UN kunvenas ĉiun duan aŭ trian monaton en Nov-Jorko.

Tial apartan gravecon havas la informado al la diplomatoj el tiuj landoj, sed precipe, kompreneble, al ties reprezentantoj ĉe UN.

2. *Studentoj el la "tria mondo"* povas esti niaj plej bonaj ambasadoroj. Se ili fariĝas esperantistoj dum siaj studojaroj, ili povas fariĝi firma kaj fruktodona kerno de loka Esperanto-movado.

Tial mi proponas al la Esperanto-societoj en universitataj urboj, kie studas ankaŭ triamondaj studentoj, klopodi venigi ilin al Esperanto-kurso. Mi ne rekomendas gvidi kurson aparte por ili. Ili eniru normalan kurson, tiel ke ili sentu, ke pere de Esperanto ili estas akceptitaj inter la esperantistoj, do ne plu izolitaj.

Por atingi tion, aparta informado devas okazi en la universitato. Studentojn-kursanojn estas bone, kiam eble, inviti membriĝi en la societo, kie oni konfidu al ili taskojn, involvu ilin en la estraron aŭ komisionojn de la societo.

3. *Mondonacoj al la Fondaĵo Afriko-Azio de UEA* fariĝas nun pli aktuala ol iam antaŭe. Plejparte el tiu fondaĵo ni devas financi la eldonadon de la Esperanto-dokumento pri la lingva problemo de nealiancaj landoj en la hispana kaj araba, kiel ankaŭ ilian senpagan distribuon.

**Tibor Sekelj**

---

## REAGJOJ

---

# Ĉu konvenus skandinavia modelo?

Du artikoloj lastatempe pritraktis la eblecojn de supera instruado en Esperanto kaj trenis tiujn ideojn el aeruma alto ĝis iom firma tero. Mi do ne volas spacmalŝpari komentante la korespondan universitaton pli ol jene: la diskuto montras bezonon kaj pretecon uzi Esperanton kiel rimedon instrui aliajn fakojn. Sendube tio povus grave stimuli la Esperantan kulturvivon sed, kiel montrite, oni povas atendi nur esceptan interesigon de studentoj sur universitata nivelo. Pli fruktodone estus, kaj por la individuoj kaj por la Esperanta kulturo, turni sin al personoj, kiuj studas ne por kariero sed por kleriĝo kaj celi ne korespondan sed lokan lernejon. Establita modelo de tia lernejo jam ekzistas sub la nomo de "popola altlernejo".

La unua popola altlernejo fondiĝis en Danlando en la jaro 1844 kaj komence de la nuna jarcento troviĝis jam 80 da ili. La ideo disvastiĝis kaj tiaj lernejoj nun troviĝas abunde ankaŭ en Finnlando, Norvegujo kaj Svedujo. La subaj informoj validas por Svedujo.

Popola altlernejo estas posedata de komunumo, ekonomia societo aŭ movado. Ĝi sin turnas al lernan-

toj pli ol deksep-jaraj, kiuj ofte loĝas kaj manĝas ĉe la lernejo. Normala kursdaŭro estas unu aŭ du jaroj, sed ankaŭ pli mallongdaŭraj kursoj troviĝas. Rektoron kaj instruistojn salajras la ŝtato, kiu pagas ankaŭ parton de la ceteraj elspezoj kaj povas finance subteni konstruadon de konvenaj lokaloj. Malgraŭ tio la popola altlernejo havas preskaŭ senliman liberecon plani kaj decidi pri kursoj kaj fakoj sen interveno de ekstere. Ankaŭ la loko de la kursoj ne estas difinita; ili povas okazi sur Kanariaj Insuloj aŭ en Laponujo egale.

Nova popola altlernejo ordinare komenciĝas kiel filio de jam ekzistanta kaj povas post kelkjara elmontrado de sia seriozeco kaj ekonomia stabileco fariĝi memstara. Se la Esperanto-movado volus ekagi sur tiu kampo, prezentiĝus pluraj malfacilaĵoj kaj unu serioza obstaklo. La serioza obstaklo estus: la lernantoj devas iel sin vivteni dum la kursperiodo. Civitanoj de la lerneja lando povas ricevi ŝtatan financon apogon, por eksterlandanoj tiu ebleco ne ekzistas aŭ estas tre limigita.

Ĉu do troviĝas rimedo venki tiun obstaklon? Laŭ mi eble jes. Reprezentantoj de multaj ŝtatoj ĉirkaŭ la mondo konstante elbabiladas belajn vortojn favore al internacia lingvo sed faras nenion pli. Kaj eĉ la plej sensignifa ŝtateto subvencias per astronomiaj sumoj "sian" lingvon. Konvenus prezenti al tiuj ŝtatoj proponon fariĝi Adopta Ŝtato aŭ Patrona Regno aŭ Pro-



tekta Lando de Esperanto, la orfa lingvo, laŭ la modelo de la alta protektanto de la kongresoj, kaj tiu honoro devus ligiĝi al devo finance subteni lernantojn en internacia popola altlernejo. La kostoj por tio ne superus la poŝmonon de iu duaranga ambasadoro.

**Bertil Nilsson**

## Iniciato el Hispanio

Mi ĝojas, ke la debato pri "koresponda universitato" vige daŭras. En la plej lasta kontribuo prof. Bruce Sherwood (Usono) verŝis malvarman akvon sur la tutan koncepton (vd. revuon *Esperanto* de junio ĉi-jare, p. 106), opiniante, ke mankas konvinkaj argumentoj.

Prof. Sherwood menciis ankaŭ la ampleksajn klopodojn de s-ro Antonio Alonso Núñez ĉe la Universitato de Santiago de Compostela, nord-okcidenta Hispanio. Temas pri projekto aranĝi "Internacian preuniversitatan kurson en Esperanto pri matematiko, fiziko kaj kemio". Kvankam mi emas aliĝi al la zorgema skeptikeco de prof. Sherwood, ŝajnas, ke Alonso Núñez sisteme aliras la problemaron. Unu el la unuaj paŝoj en la preparado estas verki taŭgajn studkajerojn. Oni raportis, ke la unuaj estos pretaj fine de la nuna jaro. Ili estus bonvena aldono al nia

scienca literaturo, sed oni demandas, ĉu la kajeroj per siaj teknika kaj preza niveloj trovos pli da favoro ĉe la libro-aĉetantoj, ol tiuj de Someraj Universitataj Kursoj, Lieĝo, Belgio. Oni kritikas SUK ankaŭ, ĉar ĝi ne donas rekonitan diplomon. Eble la Universitato de Santiago de Compostela tiukampe sukcesos per diplomoj de ties Instituto por Eduko-Sciencoj. Se vi interesiĝas pri eventuala kunlaboro en la projekto, skribu al: Esperanto-kurso, Filologia Fakultato, Santiago de Compostela, Hispanio.

Sed ĵus atingis nin alispeca kontribuo (vidu ĝin tuj sekve de ĉi tiu teksto) pri "popola altlernejo" el Skandinavio, kie tiu koncepto originis. Ankaŭ per ĉi tio, do, oni forlasis la ideon pri korespondado kaj per tio pli-malpli elŝaltis la partoprenon de triamondanoj, de kiuj kelkaj el la originaj ideoj en la debato venis. Aliflanke, tio, ke la institucio iam donu rekonitajn diplomojn estus konservita. Ĉu eblus entute kombini la ideon pri popola altlernejo kun la konkludo de prof. Sherwood, ke Esperanto povus ludi rolon kiel kontaktilo inter profesoro kaj ekz. doktoriĝonto? Sendube la plej granda problemo estus la financado, se ne paroli pri la trovado de kvalifita stabo, sed mi ŝatas la ideon, ke oficialaj instancoj, kiuj asertas, ke ili subtenas la ideon de internacia lingvo, estu petitaj konkretigi sian buŝan apogon el la poŝo.

**Geoffrey Sutton**

---

### ENKETO PRI LA 68a UK

---

## Kion opinias pri la budapeŝta UK la kongresanoj?

Dum la 68a UK disdoniĝis kvarpaĝa enketilo, kiu celis ĉerpi reagojn pri la Kongreso. Ni faris detalan analizon de la respondoj kaj ĉi tie reliefigas la ĉefajn punktojn.

Unue, oni devas konstati apation pri tiaj enketoj: 3,81% de la oficiala kongresanaro resendis aŭ redonis la plenskribitan enketilon. Kelkaj aldonis ampleksajn komentojn. Ni multe dankas al tiuj. Tamen, tiel malgranda nombro signifas, ke la statistika analizo havas tro malfortan bazon por esti fidinda.

La Esperantologia Konferenco ne tiel plaĉis, kiel en antaŭaj jaroj. Ankaŭ la Bankedo ricevis klaran malaprobon. Ambaŭ tiuj rezultoj estas malagrablaj sed utilaj kaj ni klopodos profiti de ili.

Tiuj eroj, kiuj ricevis tre altajn poentojn de sufiĉe multaj respondantoj, ankaŭ foje surprizis: la programero "Estontaj UK-oj sin prezentas" estis tre ŝatata,

same kiel "La nova Estraro sin prezentas". Duono de la teatraĵoj ricevis tre altan takson, sed kutime de nura manpleno da respondoj. Indas, tamen, menci la entuziasmon pri *Sen eliro* fare de TESPAs kaj pri *Zamenhof* fare de Jadwiga Gibczyńska. Amuze estas, ke tri respondoj asignis maksimuman poenton al teatraĵo, kiu ne okazis! Krom tio, estas agrable registri, ke la plenkunsidoj pri la kongresa temo ricevis bonan prijuĝon kaj, ke la "Tago de la Lernejo" plifortigis sian reputacion.

La demandoj pri administraj eroj kaj dokumentoj ricevis la plej grandan nombron da respondoj kaj ni foje miris pri la toleremo de kongresanoj pri kelkaj niaj fuŝoj. Ni notis kun ĝojo, ke diversaj kongresaj presaĵoj ricevis tre altajn notojn – inter ili restas la *Kongresa kuriero*, kiu jam pasintjare estigis tiom da kontentiĝo. Ĉi-jare ĉio estis tamen superita de la programkajero, kies nuna desegno ŝajnas esti kontentiga.

Fine, kiuj provizis tiujn respondojn? Preskaŭ senescepte temis pri eŭropanoj, ĉefe viroj; estis pli-malpli egala divido laŭ aĝo; meze, Budapeŝto estis la kvina UK, kiun ili ĉeestis. Duono de tiuj, kiuj taksis la programon tro ampleksa, opiniis tion ĝusta. Praktike neniu taksis la programon nesufiĉa.

**Diccon Masterman**



## La verko meritas atenton

**Esperanto aŭtodidakte; Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo**, de Audrey Childs-Mee (1926). Antwerpen/La Laguna: TK/Stafeto, 1983. 194 + 40p. Ilus. de S. Marković. 21cm. ISBN 90 6336 029 0. Prezo: 24,00 gld. Aparte haveblas kaseto kun ekzercoj (voĉoj de J. Wells & H. Rapley). Prezo: 12,00 gld.

Tiu ĉi nova lernolibro ambicias samtempe internaciecon kaj aŭtodidaktecon, t.e. malfacile atingeblan duoblan celon. La lernolibroj sen nacilingvaj klarigoj estas kutime destinitaj al rektametoda kurso, kaj por tia kurso la verko de A. Childs-Mee, instruistino jam renoma i.a. pro siaj kursoj en Grezijono, certe povas taŭgi. Ĝi prezentiĝas pli moderna, sed pli modesta laŭ la leksika enhavo, ol *Junulkurso* aŭ *Privilegia vojo*. Ĉu la aŭtodidakto ĝuste komprenos ĉiujn vortojn kaj frazojn helpe de la bildoj? Tion montros la praktiko. Unuavide oni povas diri, ke la bildoj de Stano Marković estas ĝenerale trafaj.

La progreso estas tre malrapida, kio tute taŭgas por la celo de tiu metodo. Demandoj kaj respondoj estas farataj ĝis enkapigo de la koncernaj nocioj kaj vortoj. Oni tamen povas dubi, ĉu unu tutpaĝa listo de verboj (p.48) necesas por klarigi la diferencon inter *as-* kaj *is-*tempoj.

Certe trafa estas la uzo de la akuzativo jam en la unua paĝo (*la viro vidas la virinon/la viron vidas la virino; ĝi estas hundo/ŝi havas hundon*). Sed *is* kaj *os* aperas malfrue (resp. p.47 kaj 99) kaj la sintagmoj *-as-i* (*li deziras legi libron*) kaj *-as, ke -u* (*ĉu vi permesas, ke mi rigardu ĝin?*) ankaŭ (p.48 kaj 155). Same pri *et* kaj *eg*, kiuj aperas nur sur p.116.

La sistemo de la demandoj-respondoj ne estas ĉiam adekvata. Al la demandoj: *Kio estas sur la tablo?* kaj *Kiom da valizoj estas sur la tablo?* (p.15) la plenaj respondoj estas ja: "Sur la tablo estas...", dum la aŭtorino postulas *Valizo estas sur la tablo* kaj *Tri valizoj estas sur la tablo*. Tiu misorganizo de la sistemo konata/nekonata en la dialogoj aperas kelkfoje en la libro (kp. p.36: *Per kio homo legas? – Per okuloj homo legas...*). Krom la banalaĵoj, la ofta miso de tiaj metodoj estas la ... malbanalaĵoj: *Kiom da buŝoj havas la knabo? Ĉu ŝi aŭskultas per la buŝo?*

Inter la kritikindaĵoj ni notu ankaŭ la jenajn: la uzo de *al sur* kaj *al en*, enkondukitaj por klarigi *sur -n* kaj *en -n*, povas kredigi al la lernantoj, ke tiuj sintagmoj estas efektive uzataj. *De antaŭ naŭ jaroj li vivas kun fratino* (p.100) estas eraro (ĝuste estas: de naŭ jaroj). En *Hieraŭ, dimanĉo la 20-a de majo, Aka skribis al Karu* mankas la akuzativo (p.102). *Fiŝo kuirota* (kaj similaj sintagmoj sur p.161) ne povas egali al

*oni kuiras la fiŝon*, ĉar la dua eldiro enhavas verbon, la unua ne.

Koncerne semantikon, oni devas noti la trouzon de *iri* (ne nur disko *iras* sur la gramofono – p.27, sed eĉ birdoj *iras* en la aero – p.66), la neĝustan difinon de *migri* sur p.154 (oni ne migras nepre "de unu lando al alia"), la malĝustan ekvivalentigon de *mangejo* k.s. kun *mangoĉambro* kaj, pli grave, de *sidejo* kun *sidĉambro* – se tiu lasta estas efektive uzata (p.166). *Viŝtuko* estas nomita *sekigilo* kaj *subrobo* – *subjupo* (p.192-193). Oni ekscias sur p.56, ke simio havas piedojn. Kaj oni rimarkas sur p.52 la jenan strangaĵon: *Kiam la veturiloj iras sur vojoj ili estas trafiko*.

Sed la plej kompetentan prijuĝon de tiu lernolibro faros la kursgvidantoj kaj lernantoj, kiuj ĝin uzos. La verko de Audrey Childs-Mee nepre meritas ilian atenton.

Michel Duc Goninaz (Francio)

## Stumblaĵoj pro timo

**Por multoble plivastigi nian movadon ni ĉiam uzu nur Esperanton tre facile kompreneblan!** Albert Lienhardt (1904). Mulhouse: Ligue Française "Pro Unesco", 1982. 64p. Mimeo. 21cm. Prezo: 7,50 gld. **Facilaj dialogoj/Dialogues faciles**, A. Lienhardt. Mulhouse: Ligue Française "Pro Unesco", 1982. 56p. Mimeo. 14cm. Prezo: 9,60 gld.


La unua verko – kun sufiĉe impona titolo – estas broŝuro, kiu kunigas faskon da artikoloj prilingvaj, el kiuj parto antaŭe jam aperis en diversaj revuoj. Iliaj temoj estas pli-malpli tradiciaj: ne nur simplaĵoj kiel ekz. la interpunkciado, la evitado de tro kompleksaj vortformoj, sed ankaŭ pli tiklaj aferoj, kiel ekz. la konata "problemo" de la pasivaj participoj, aŭ pri *igi* kaj *iĝi*. Ankaŭ la lastatempe ŝatata "esperantigo de propraj nomoj" ne mankas. Kiel ĉe tia temelekto ne eviteblas, Lienhardt ne ĉiam povas esti tre originala. Tamen ofte lia multjara sperto diktas saĝajn sugestojn.

Sed, pure principe mi tie ĉi volas rememorigi pri eldiro de Zamenhof el 1891 (*Ni laboru kaj esperu!* Eld. Ludovikito, 1974): "Pro la unueco kaj senkonfuza ordo, kiuj estas por nia afero tiel gravaj, la libroj instruaj devas esti pedante konservativaj eĉ en la plej malgranda bagatelo!" Miaopinie tiu averto ĉiam ankoraŭ restas valida por ĉiuj lerniloj de Esperanto. Tial mi do bedaŭras konstati, ke Lienhardt de tempo al tempo devias de tiu saĝa sinlimigo: ekz. li prave proponas, ke en lernolibroj oni dismembrigu la kompleksajn formojn, por ke la ne-jam-spertaj komprenu tiujn vortojn sen tro da malfacilo. Sed por tion fari, li ekuzas la apostrofon meze de la vortoj: *ali'flanke*, *fal'ig'inta*, *bon'gusta* kaj krome la streketon: *mal-bona*. Per tro komplika rezonado li distingas ambaŭ signojn jene: *pli-bel'iĝas*, *ne-kalkul'ebla* ktp. Ĉu liaj



lernantoj el tio profitos? Pli gravas, ke kontraŭ la *Fundamento* li instruas, ke anstataŭ "estis ...ita" preferu oni uzu "...iĝis" aŭ eĉ la drakecan formon "iĝis ...ita". Ankaŭ ne konforme al la *Fundamento* li daŭre uzas *far* anstataŭ *de* ĉe la pasivaj konjugaciaj formoj (... estas razita far barbiro... p. 23). Kaj multege min mirigis lia senpera identigo de ekz. "sin razi" (kion ofte mi faras) kun "raziĝi" (kio al mi ĝis nun neniam okazis: koboldoj iom maloftas).

Lia timo antaŭ komplikaj vortformoj igas lin uzi stumblaĵojn kiel ekz.: *samatempe*, *staciodomo*, *marokolo*, *alialoke*, *nacialingve*... Malgraŭ pluraj en si mem trafaj konsideroj, kiuj la verkaĵon faras tamen utila por kursgvidantoj kiuj ne disponas pri multaj



helpiloj, mi forte dubas, ĉu ĝi taŭgus por la pligranda publiko de la komencantoj aŭ progresantoj. Fakte, mi konfesu mian timon, ĉu la verko eĉ atingos sian publikon: tuj unuavide jam malallogas la aspekto. Kial ne simple purigi la tajpilon antaŭ ektaĵo de verkaĵo eldonota? Multaj literoj *e*, *o*, *a*, *m*, *s* plene nigriĝis.

La dua verkaĵeto estas iom simila je la jam famaj *Amuzaj dialogoj* de la sama aŭtoro. Ĝia aspekto estas pli bona ol tiu de la alia. Same kiel *Amuzaj dialogoj* (mi supozas), ankaŭ tiuj ĉi dialogoj trovas la vojon al la grupetoj, kies kursojn sekvas komencantoj. Kvan-kam ne mond-skuaj (kion ili ja ne pretendus), ili estas bone uzeblaj por paroligi junulojn ankoraŭ iom hezitemajn. Tion spertis mi mem! Dankon al la aŭtoro: li verku pliajn.

**Gerrit Berveling (Nederlando)**

## Utila superrigardo

**Jazyk Esperanto.** M.I. Isajev. Moskva: eld. Nauka, 1981. 88p. 22cm. Serio: Lingvoj de la popoloj de Azio kaj Afriko. Prezo: 6,00 gld.

Kiel titolo en la jam 115-kajera serio "Lingvoj de la popoloj de Azio kaj Afriko", eldonata de la akade-

mia eldonejo Nauka, aperis ruslingva libreto pri Esperanto fare de la konata soveta interlingvisto prof. d-ro M.I. Isajev. Ĝi entenas koncizan superri-gardon pri la evoluo de la ideo pri internacia lingvo, elstarigante la pozicion de la Esperanto-movado, tut-monde kaj en Sovetunio. Sekvas detala tradicigrama-tika priskribo de Esperanto kun la partoj fonetiko, leksiko, frazeologio, morfologio, vortospecoj (sub-stantivoj, adjektivoj, adverboj, pronomoj, numera-loj, verboj, prepozicioj, konjunkcioj, partikloj, inter-jekcioj), vortfarado (neadekvate prezentita), sin-takso.

La apendico enhavas utilajn tabelojn pri interna-ciaj kaj naciaj Esperanto-organizaĵoj, listigas ĉiujn UEA-kongresojn ĝis 1981 kaj prezentas kelkajn gra-vajn resoluciojn pri Esperanto (i.a. tiun de Unesko en 1954). Krome oni trovas liston de sovetaĵ eldona-ĵoj en Esperanto de 1963 ĝis 1978, opiniesprimojn de eminentuloj pri Esperanto, literaturajn tekstojn (kun rusa traduko) kaj malgrandan Esperanto-rusan vort-areton. La bibliografio estas utila, tamen nepre plibo-nigenda kaj senerarigenda. Entute tre utila verko, modelo por similaj superrigardoj en aliaj naciaj lin-gvoj.

**Detlev Blanke (Germana DR)**

## Sopiro al infano

**Unu tago post la alia; Letero al infano naskita**, de Clelia Conterno Guglielminetti (1915). El la itala trad. Roger Bernard. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 135p. 21cm. Prezo: 36,30 gld.

Moda temo de la lastaj jaroj koncernas tiujn homojn, kiuj ial kaj iel deziras ne naski. Malpli ofte oni legas pri la mala, sed same serioza, problemo: tiu de la paro, kiu volas havi infanon, sed ne povas.

Ĉi tiu aŭtobiografia libro detale prezentas al la leganto la mensostaton de virino, kiu dum jaroj ne sukcesas naski. Eĉ kiam ŝi gravediĝas, trifoje la afero finiĝas per aborto. Nur nova kuracilo finfine ebligas al ŝi naski, sed por malhelpi denovan aborton ŝi devas resti kuŝanta preskaŭ dum la tuta periodo de la grave-deco.

En varia maniero la aŭtoro prezentas sian rakon-ton. La unua parto estas en la formo de taglibro, kiu komenciĝas optimisme en la esperplena periodo tuj post la milito. Iom post iom ĝi malkaŝas la seniluzii-ĝon de la seninfana paro, la provojn de la aŭtoro ali-maniere plenigi sian vivon, kaj ŝian kreskantan sen-ton de malutileco kaj senespero.

Tielnomata "Intermezo" priskribas nerealan periodon de senrezultaj gravediĝoj. Poste, dum la monatoj kiam ŝi devas resti senmova, ŝi verkas lete-ron al la naskiĝonta infano, kiu konsistigas la duan parton de la libro. La rakonto ne haltas je la "ĝoja konkludo", sed daŭrigas al la tria parto: "Estiĝas



lumo en animo". Tie ni vidas la nun mezaĝajn gepatrojn kun la tiom sopirita infano.

Min amuzis la priskribo de tiuj bagatelaj problemoj, kiuj tuj post la nasko ŝajnas gigantaj, ekzemple pri la ĝusta grandeco de la truo en cicumo (se tro malgranda, la lakto ne bone fluas; se tro granda, la bebo vomas). Aliflanke... la leganto emas demandi sin, ĉu nur el ĉi tio konsistas tiu mirakla evento, kiun ŝi atendis dum tiom da jaroj? Eble inter la amaso da detaloj pri suĉboteloj kaj vindotukoj perdiĝas la ĉefa mesaĝo.

La traduko de Roger Bernard ĝenerale ne trudas sin antaŭ la teksto, kvankam foje lia vortelektado ŝajnas tro influita de la itala kaj franca. Min aparte ĝenis la uzo, komuna al ambaŭ lingvoj, laŭ kiu nenaskita infano estas aŭtomate supozata esti "filo".

Klarigoj pri specifaj italaĵoj foje estus bonvenaj. Kiom da ne-italaj legantoj scius, ekzemple, ke italoj faras oficialajn petojn sur speciala stampita papero, aĉetebla en butikoj kun la indiko "Saloj kaj tabakoj"?

**Anna Brennan (Italio)**


## Arda batalo por libero

**Verkoj de Verda Majo**, de T. Hasegawa (1912-1947). Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982. 501p. Ilus. 22cm. Bind. Prezo: 19,80 gld.

Verda Majo vivis en tempo, kiam estis danĝere esti alia. Sed ŝi ja estis alia. En Japanujo de la 30aj jaroj ŝi strebis al libereco. Ŝi deziris, ke junuloj, speciale filinoj, ne tiel senkondiĉe ŝuldu obeon al siaj gepatroj; ŝi agadis, por ke la virinoj fariĝu memstaraj, aktivaj, egalrajtaj. Konsekvence ŝi kontraŭis la japanan totalismon, aktivis en komunisma organizaĵo. Esperanto kiel fenestro al la mondo estis por Verda Majo integra parto kaj ilo en tiu agado por libereco. Ŝi membris en la proleta Esperanto-movado. El la perspektivo de la regantoj, Verda Majo do estis duoble danĝera: ŝi subtenis la danĝeran ideologion kaj parolis la danĝeran lingvon. Kaj ŝi faris trian paŝon danĝeran por totalistoj: ŝi edziniĝis al eksterlandano, ĉino eĉ, kontraŭ kies lando Japanujo agresmilitis.

La verkoj kaj tradukoj de Verda Majo spegulas ŝian ardan engaĝiĝon en la batalo por libereco, ŝian kaŝvivon kiel komunistino en Japanujo kaj kiel japanino en Ĉinujo. La eldonantoj prave aldonis longan antaŭparolon de Ĵelezo pri Verda Majo, kaj ŝian propran priskribon de la unua jaro "en Ĉinio batalanta". Ĝi ankaŭ estas unu el la jam iom konataj eroj de la libro, multaj el kies enhavaĵoj jam ie publikiĝis, tamen hodiaŭ ofte nealireblaj en iuj milittempaj stencileldonoj aŭ revuoj. La temoj, kiujn Verda Majo traktas, estas multaj kaj diversaj: la virina situacio, kaŝvivo de esperantistoj kaj de verkistoj en Japanujo, mallibereja vivo de komunistoj, japana literaturo, utileco de fekaĵo kiel sterko ktp. Por Esperanta infan-

### VERKOJ DE VERDA MAJO



ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO



revuo ŝi montras, kiel Japanujo subpremas siajn ajnuajn, koreajn kaj ĉinajn regatojn kaj rakontas, kio estas eklipso. Ĉion ĉi ŝi verkis en Japanujo. Sekrete vojaĝinte al Ĉinujo, ŝi verkas kaj tradukas aron da artikoloj kaj leteroj pri sia gastiga lando. Tiuj estas kolektitaj sub la titolo "Flustr' el uragano". La dua ĉeflaboro de ŝia ĉina periodo estas traduko de la longa rakonto "Vivantaj soldatoj", en kiu la japana ĵurnalistino Tatzoo Isikawa priskribas la kruelan japanan armeon, kiu konkeras Nankinon (en 1937).

Verda Majo verkis en ideoriĉa, neeŭropa kaj krea Esperanto, kaj la teknika aranĝo de la libro havas la kutiman bonan ĉinan kvaliton. La libro estas interesa, kaj por la esperantista leganto aparte senpera dokumento de la milita tempo en orienta Azio. Verda Majo ne partoprenis la grandan politikon, sed estis unu el tiuj, kiuj suferis ĝiajn sekvojn. Valoris la penon kolekti ŝiajn disajn laborojn.

**Klaus Schubert (FR Germanio)**

## Prioritato al la libera evoluo

**Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto**, François Lo Jacomo (1954). Paris: eld. de la aŭtoro, 1981. 384p. 24cm. Prezo: 39,00 gld.

Ĉar ne oftas esperantologiaj disertacioj, jam ĉi-kaŭze la prezentata verko estas salutinda, des pli ke ĝi pretiĝis sub la gvido de la fama lingvisto André Martinet.

La libro penas respondi la demandon, al kio ni donu prioritaton – ĉu al la evoluo aŭ al la evoluigo de Esperanto, kiun rolon ludu la Akademio, CED kaj aliaj eventualaj ekspertaj instancoj. Nu, fakte, la ĉefa demando estas konsiderata nur sur la lastaj paĝoj, sed kvankam la demandoj ricevas respondojn, tio ne signifas, ke la leganto ne plu havas dubojn pri vojoj irindaj.



Antaŭ ol konkludi, la aŭtoro pli-malpli detale prilumas la strukturon de Esperanto (fonologio, sintakso, vorttrezoro), ekzamenas rilatojn inter la vorto kaj la morfemo, pridiskutas tion, kio jam estis pridiskutita antaŭe (komputilo/komputoro, la seksa diskriminacio ĉe pronomoj, tabelvortoj kun *ali-*, *ata/ita*, akuzativo, naturalismo-skemismo en la leksiko ktp.), evitante eldiri tranĉe sian opinion, li eldiras amason da rimarkoj pri plej diversaj temoj.

Laŭ mi, gravas, ke la aŭtoro donas prioritaton al la libera evoluo per etaj, nerimarkeblaj paŝoj, simile al la naciaj lingvoj. Aliflanke, la aŭtoro, eble, tro kontraŭas normigon kaj pledas nur por prognozato, konsilado surbaze de esploro de tendencoj. Evidente,

ekzistas paradokso pri tio, ke la planlingvo Esperanto rezistas al planado (ĉar ĝi estas lingvo kaj ne plu projekto). Cetere, planado kaj normigo ne estas sinonimoj de evoluigo. La unuaj estas aplikataj eĉ al naciaj lingvoj, do ne evitu tion Esperanto.

Kredeble, ne ĉiuj konsentos kun ĉiuj vidpunktoj de la aŭtoro (ekzemple, li kontraŭas la principon de gramatika kategorieco de la radikoj). Nenio terura: en diskutado naskiĝas la vero. Legu la libron (se vi pli-malpli komprenas la francan), cerbumu, diskutu kun la aŭtoro (almenaŭ mense) kaj formu vian propran opinion pri la esencaj trajtoj de Esperanto kaj de ĝia sorto.

**Boris Kolker (Soveta Unio)**

## Kapablo trafe kaj klare prilumi la kernon de problemo


**La lingva esenco de Esperanto**, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 175p., 21cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld.

Atanasov pritraktas en tiu ĉi libro diversajn aspektojn de Esperanto, kiuj estas konataj "tiklaj punktoj": vortfarado, *ata/ita*, neologismoj k.s. Sen granda entuziasmo mi malfermis ĝin, antaŭsupozante ian tedan ŝablonecon; sed tre baldaŭ mi entuziasmiĝis. Atanasov estis klerulo, kiu havis maloftan talenton: kapablo trafe kaj klare prilumi la kernon de iu ajn problemo kaj ĝin "solvi" konvinke. Li estis maloftulo ankaŭ alirilite: li estas unu el la malmultaj, kiuj konas kaj atentis la laboraĵojn de aliaj, kaj ne ĉiam

denove komencis kvazaŭ de Adamo. La libro do estas rekomendinda eĉ al spertaj esperantistoj, sed ĝi estas absolute valora por relative novaj, lernemaj progresantoj, kaj ĝi devus esti lernolibro en progresantaj kursoj.

Ordinare mi malmulte atentis preserarojn (da kiuj estas iom tro en la libro); sed kiam ili trudiĝas en ekzempligojn, ili povas kaŭzi gravajn miskomprenojn. Tiaj estas: *bluokulo* (meze de p.21) devas esti *bluokula*; *ĝi* (supre de p.53) devas esti *li*; mia ŝuldo estas pagita (meze de p.57) devas esti *estos*; sur p.73: *pro* esprimas kaŭzon, kiu sekvigas ion; ĝi (...?) al *kaŭze de*, *sekve de* – ĉu la mankanta vorto eble: *egalas*?

Lia eseo pri la vortfarado en Esperanto estas brila, kaj plena de citindaĵoj. Li ekiras de la 11a gramatika regulo de la *Fundamento*, kiu enhavas la gravan sed tro malmulte atentitan frazon: "La gramatikaj finaĵoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj". Li prave konstatas la naturon de la ĝenerale akceptita opinio, ke la radikoj enhavas ian gramatikan karakteron: "Kutime la gramatikan karakteron oni konstatis laŭ la vortospeco (substantivo, verbo, adjektivo), en kiu la radiko estas tradukita en la *Universala vortaro*" – do ke la gramatika karaktero estis fakte trudita de kelkaj hindeŭropaj lingvoj. Li atentigas pri la konsiderinda fakto, ke "... tamen restis kvanto (negranda) de dubaj radikoj, kies gramatika karaktero ne estas evidenta..."; sed laŭ mi tiu kvanto ne estas tiel negranda: kiu, ne kontrolinte en vortaro, scias, ĉu la radiko *am-* estas verba aŭ substantiva? Tiurilate li citas sur p. 26 la opinion de R. Rossetti: "Kelkaj radikoj estas pli-malpli neŭtralaj: neniuj gramatika karaktero ĉefas. Ilin vortaristoj arbitre asignas al unu aŭ alia kategorio". La karakterigo de radikoj eble estas oportuna, sed ni devus rekoni, ke ĝi estas funde



**Atanas D. Atanasov (1892-1981) havis elstaran talenton por klare prilumi la kernon de ĉia problemo.**



arbitra. Mi trovas bedaŭrinda, ke niaj gramatikistoj ĝenerale ignoras, kiam temas pri vortfarado, la laboron de niaj poetoj, ĉar la kreado de trafaj vortkunmetaĵoj estas grava faktoro en nia poezio. Tiurilate mi malkonsentas kun Atanasov, kiam pri fuŝaj kunmetoj kiel *belknabino* li diras: "Ni povus do allasi kaj toleri tiajn esceptajn kunmetojn nur kiel 'poetajn licencojn' en la versfarado, trudataj iufoje de la metriko". Ni tute ne allasu kaj toleru la fuŝaĵojn de nekompetentuloj, ĉar la poetoj post 1920 pruvis, ke la metriko ne trudas fuŝan lingvaĵon al kompetentuloj!

Traktaĵoj pri la fonetiko de Esperanto estas maloftaj, kaj ordinare tro teknikaj. Tiu de Atanasov estas bonega: "...*t, s kaj c* estas tri apartaj fonemoj, diferencaj laŭ sonado; do *kat-simila* absolute ne estas *kacimila*; tiel ankaŭ *kotŝirmilo* ne estas *koĉirmilo*!"


Disputado pri ata/ita pli-malpli ĉesis, sed Atanasov ankoraŭ havas ion dirindan, ekzemple: "La komplekso *esti + partícipo* ne reprezentas verban formon; erare estas paroli pri "kompleksaj formoj"; aŭ "... jen mi hazarde trafas informon pri fondiĝo (en pasintaj jaroj) de Societo de Blindaj Esperantistoj en Nederlando: 'En 1929 nia societo *estis fondata*'. En tiu ĉi momento mi havas grandan deziron, ke la informanto estu apud mi kaj mi demandu lin amike: "Kiom longe daŭris tiu ĉi fondado kaj en kiu tago vi jam povis diri: 'nun la societo *estas fondita* kaj ni povas jam alpaŝi al laboro por realigi ĝiajn celojn'?"

Kun plezuro mi konstatis, ke Atanasov ne nur legis, sed ankaŭ subtenas, miajn proponojn pri la transskribo de propraj nomoj!

Prave konstatante, ke la ĝusta uzado de prepozicioj estas aparte grava kaj ne ĉiam facila, la aŭtoro prezentas relative mallongan, sed brilan, klarigon pri kelkaj el ili, precipe la malfacila *de*, kaj la diferenco *kun/per*. "Nuanca diferenco estas inter la esprimoj: Akcepti proponon *per* aklamoj ~ Akcepti proponon *kun* aklamoj, (*kun*: aklamoj akompanas la akcepton; *per*: aklamoj servis por esprimo de la akcepto)." Li skribas tre interese pri misuzoj de *pro* en la *Fundamento de Esperanto* mem, ankaŭ pri la prepozicio post la verbo *danki* (ĉu *pri*, *por* aŭ *pro*?), kaj pri akuzativo post *kontraŭ*.

Pri multaj aliaj temoj: sinonimoj, interjekcioj, tradukado, tiel-kiel, tiom-kiom ktp., Atanasov estas leginda. Eble li tro modeste traktas la interjekcion *nu*, por kiu mi trovis en libro pri la jida lingvo 16 diversajn signifojn, kiujn mi renkontis ankaŭ en Esperanta uzado; pri la finaĵo *-es* kiel ĝenerala posesivo li ial ne notas ties plej kondamnan malforton, nome ke ĝi ne distingas inter singulara kaj plurala (*la knabes pilko* – kiom da knaboj havas la pilkon?); iom bedaŭrinde, li pledas por paralela uzado de du interpretoj de *po*. Sed ĉiu leganto devus fini la libron pli saĝa ol kiam li eklegis ĝin!

**W. Auld (Skotlando)**



**Bela revulo**, Geng Geng. El la ĉina (1979). Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983 (2a eld.). 38p. Pentris Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. 21cm. 88-Es-152P. Fablo pri la valoro de persistemo en lernado. Prezo: 3,00 gld.

**Branĉeretoj**, Marie-Andrée Chauteur. El la franca trad. R. Laval. Nîmes: la tradukinto, 1983 (ne indikita). 37p. Ilus. Mimeo. 21cm. Mallongaj poemoj. Prezo: 7,20 gld.

**Castigliano come base e mezzo di pianificazione interlinguistica, II**, Valerio Ari (Giorgio Silfer). Bellinzona: "Hans Dubois", 1983. 50p. Mimeo. 30cm. Itallingva doktoriĝa disertaĵo: La kastilia kiel bazo kaj rimedo de interlingvistika planado. Prezo: 15,00 guldenoj.

**Cent humorajoj; Facilaj legaĵoj de Esperanto**. El la ĉina komp. Li. Beijing: Eldonejo Scio, 1983. 28p. 19cm. Libron-ro 9214.21. Cent tute mallongaj legaĵoj i.a. por komencantoj. Prezo: 3,60 guldenoj.

**Doktrino de Karl Marks kaj kelkaj aspektoj de la socialisma konstruado en USSR**, La, Ju.V. Andropov. Moskva: APN, 1983. 29p. 17cm. Oficiala parolado. Prezo: 1,50 gld.

**El Anatol; kvin unuaktaĵoj** (1893), Artur Schnitzler (1862-1931). El la germana trad. Leopold Grimme k.a. Wien: Aŭstria Esperanto-Instituto, 1983. 67p. 21cm. Teatraĵoj de la konata aŭstra dramisto kaj romanisto. Kun humuro kaj aparta talento por priskribi personecojn. Prezo: 9,90 guldenoj.

**Esperanto – jekik i pokret; B**, Z. Martinov k.a. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1980. Informilo de bazaj faktoj pri la Movado kaj literaturo de Esperanto. Prezo: 9,00 gld.

**Esperanto, lernolibro de la Internacia Lingvo**, R. Imbert, T. Sekelj k.a. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1982 (4a eld.). 60p. 21cm. Originala lernolibro laŭ la "zagreba metodo", surbaze de la 400 plej oftaj radikoj. Prezo: 9,00 guldenoj.

**Esperanto: Metodo 15; Aventuroj de sinjoro "Mimem"**. Paris: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1983. 29p. Ilus. Mimeo. 30cm. Pedagogia materialo, celanta paroligi komencantojn per simplaj bildoj. Prezo: 10,20 guldenoj.

**Esperanto, The International Language**, W.J. Downes. London: Brita Esperanto-Asocio, 1983 (ne indikita). 203p. 18cm. Kompleta 25-leciona kurslibro por angla-lingvanoj, laŭ gramatika metodo. Enestas indekso, kaj la ekzercoj havas plenan tradukon. Prezo: 21,00 guldenoj.

**Gerda malaperis!** Claude Piron (1931). Chapecó: Fonto, 1983. 48p. 21cm. Lingvo-instrua romaneto, bazita sur la principo motivi la lernanton per reduktado de novaj lernendaĵoj. Prezo: 3,60 gld.

**Gramatiko de Esperanto**, komp. Wei Yuanshu kaj Xu Wenqi. Shanghai: Ŝanhaja Eldonejo por Fremdlingva Instruado, 1982. 276p. 19cm. La unua kompleta ĉinlingva gramatiko de Esperanto post 1949. Prezo: 15,00 gld.

**Hibakusha**. Tôkyô: Nihon Hidankyo, 1982. 20p. Ilus. 26cm. Esperanta, angla-, itallingva libreto pri la efikoj de la atombombaj atakoj al Hiroŝima kaj Nagasaki. Prezo: 5,40 gld.

**Infanoj en Hiroŝimo**, div. aŭtoroj. El la japana trad. Sadami Tanaka. Osako (ne indikita): Japana Esperanta Librokooperativo, 1983. 64p. ilus. 18cm. Kvar historioj pri la atombomba atako al Hiroŝimo. Prezo: 6,00 guldenoj.

**Interlinguistica Tartuensis II; Teorio kaj historio de internacia lingvo**. Tartu: Tartu Riikliku Ülikool, 1983. 122p. 22cm. Ok akademijaj traktaĵoj pri interlingvistikaj kaj Esperantaj temoj, redaktitaj i.a. de Paul Ariste. Tute ruslingva, kun resumo en Esperanto. Prezo: 15,00 guldenoj.

**Internaciaj dancoj 1**, komp. Eckhard Bick. Bonn: LUDAKA, 1982. 28p. Mimeo. 21cm. Instruilo de diversnaciaj popoldancoj; kelkaj kun muziknotoj. Prezo: (kun kaseto) 13,50 gld.

**Kaguya Hime; Lumanta princino**, Hideo Sinoda. Tôkyô: Asake-Syoboo, 1982. 18p. Plenkolora ilus. 21cm. Originale verkita laŭ la plej malnova japana fabelo, pli ol-miljara. Prezo: 7,50 gld.

**Katalogo de Esperanto-poŝtstampoj (1983)**, komp. R. Burmeister. Eldonloko ne indikita: Esperanto-Ligo Filatelista, 1983. 27p. 21cm. Informoj pri 640 poŝtaj stampoj kaj aliaj Esperanto-rilataj filatelaĵoj. Prezo: 18,00 guldenoj.

**Kemia nomenklature**, Jan Pióro. Frankfurt am Main: G. und M. Westermayer, 1983. 37p. Mimeo. 21cm. ISBN 3-923596-20-0. Propono pri Esperanta nomsistemo por la kemio. Prezo: 10,80 guldenoj.

**Kiel bretono iĝis reĝo de Anglujo**, Per-Jakez Helias (1914). El la franca trad. Frédéric Le Magadure. Eldonloko ne indikita (Francio): Grupo de Esperantistaj Edukistoj, 1983 (ne indikita). 56p. Ilus. 21cm. ISBN 2 86775 001 4. Kvar rakontoj kun bretona etoso. Ilustrita per infanaj desegnaĵoj. Prezo: 6,30 gld.



**Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario** (1971). El la bulgara trad. Genčo Genčev. Sofia (ne indikita): Bulgara Esperantista Asocio, 1980. 48p. Mimeo. 19cm. Prezo: 4,20 guldenoj.



**Margene de la lernolibro**, Bernard Golden (1925). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 58p. 20cm. ISBN 963 571 083 6. Kolekto de studaĵoj kun la celo instrui ĝustan lingvo-uzon – prononcon, gramatikon, vortfaradon, semantikon, tradukadon, stilon ktp. Prezo: 6,60 guldenoj.

**Mesaĝo al civiluloj de la mondo/Message to the Modern World** (1856), Seattle. Frankfurt am Main: G. und M. Westermayer, 1983. 16p. Ilus. 15cm. ISBN 3-923596-01-4. Dulingva teksto de la parolado de tribestro. Prezo: 2,10 gld.

**Mikrokomputilo: ĉu amiko aŭ malamiko?** Red. Péter Broczkó. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 64p. Ilus. 24cm. ISBN 963 571 121 2. Multinforma artikolaro pri komputado, ĉefe pri mikroelektroniko kaj mikrokomputiloj; kun informoj el pluraj ĉi-teme neglektataj landoj. La celita legantaro estas ĉiuj uzantoj de komputiloj, ĉu ŝatokupaj ĉu profesiaj. Prezo: 7,50 guldenoj.

**Mikronoveloj de Sin'iti Hosi**, Sin'iti Hosi (1926). El la japana trad. Kikunobu Matuba. Tôkyô: Libroteko-Tokio, 1983. 76p. Ilus. 18cm. Hosi estas "la majstro de la mikronovelo". Li verkas kun nihilisma inklino, atentigas nin kritike pri modernaj viv-fazoj. Ofte amara, ĉiu noveleto prezentas freŝan ideon, kompletan intrigon. Prezo 21,00 guldenoj.

**Modela statuto de konsumkoopertivo**. El la bulgara trad. G. Dolapčiev. Sofia: Centra Kooperativa Unuiĝo, 1983. 30p. Mimeo. 20cm. Prezo: 3,00 guldenoj.



**Neologisma glosaro; Eta postrikolto al PIV**, Henri Vatré (1908). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 48p. 21cm. Jubilea Eldon-serio: 3. Esperantologio 4. Listo de proks. mil vort-proponoj, kiuj ne troviĝas en PIV; kun ties fontoj. Prezo: 7,50 gld.

**Ni vivos!** Julian Modest (pseŭd.). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1983 (ne indikita). 53p. 20cm. ISBN 963 571 119 3. Originale verkita dokumenta dramo pri la lastaj jaroj el la vivo de Lidia Zamenhof, la filino de la iniciatinto de Esperanto, kiu estis mortigita en nazia koncentrejo. Prezo: 8,10 gld.

**Osnovnye ponjatija i termini interlingvistiki**, S.N. Kuznecov. Moskva: Universitet Družby Narodov, 1982. 80p. Mimeo. 22cm. Ruslingva akademika traktaĵo pri interlingvistikaj terminoj. Prezo: 9,00 guldenoj.

**Palmŝtrojmo** (1910), Christian Morgenstern (1871-1914). El la germana trad. Richard Schulz. Paderborn: Esperanto-Centro, 1983. 181 p. 19 cm. ISBN 3 922570 36 4. Traduko de *Palmströmm*: kolekto de poeziaĵoj kaj prozaĵoj, kiuj absurdigas naturalismon, parodias estetikismon kaj ridindigas romantikismon. Morgenstern estis aparte konata pro siaj ŝercoj kaj burleskaj versaĵoj. Prezo: 18,30 gld.

**Patrino, La** (1920), Grazia Deledda (1871-1936). El la itala trad. G. Lacertosa. Venezia: Mestrina Editrice, 1983. 136p. 21cm. Verko de itala romanistino, konata pro sia "konsciencema realismo". Ŝi ricevis la Nobel-premion en 1926. Prezo: 23,10 guldenoj.

**Poeto fajrokora; La verkaro de Julio Baghy**, Marjorie Boulton. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 144p. 20cm. Jubilea Eldonserio: 3, Esperantologio 5. Literatura kritiko pri la verkaro de Julio Baghy (1891-1967), unu el la plej famaj Esperantaj verkistoj, kun resuma biografio. Enkonduko kaj bibliografio de R. Haupenthal. Prezo: 39,60 gld.

**Por ekologia socio** (1971-74), Murray Bookchin. El la angla trad. "D.C.". Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais "Laŭte", 1983. 119p. Mimeo. 21cm.

SAT-Broŝurservo. Kolekto de kvin artikoloj pri rilatoj inter la ekologio kaj anarkiismo. Prezo: 6,00 gld.

**Printempa danco/Mazzifna tarrebbiegħa**, Mario F. Bezzina (1950). El la malta trad. Carmel Mallia. B'kara: Literatura Viglo, 1983. 38p. 21cm. Dulingva eldono malta kaj Esperanta. Moderna poemaro de konata malta poeto. Prezo: 4,50 gld.

**Sango kaj amo**, Godfried Bomans (1913-1971). El la nederlanda trad. W.H.W. van Liempt. Eldonloko ne indikita (Nederlando): Fondaĵo "Esperanto ĉe la instruado", 1983. 67p. 20cm. Triakta teatraĵo pri mezepokaj okazaĵoj de verkisto bone konata pro sia humuro. Prezo: 12,90 guldenoj.

**Septembra poezio**, div. aŭtoroj. El la bulgara trad. diversaj. Sofia: Bulgara Esperantista Asocio, 1982. 44p. Mimeo. 20cm. Versaĵoj pri la ribelo de 1923 en Bulgario. Prezo: 7,20 gld.

**Septembro estiĝas majo**, komp. N. Kjuĉukov, red. L. Raeva. Sofia: Sofia-Pres, 1983. 192p. 20cm. Antologio de rakontoj kaj poemoj pri la kontraŭfaŝisma Septembra Ribelo de 1923 en Bulgario. La libro inkluzivas verkojn tradukitajn el la bulgara kaj originale Esperantajn. Prezo: 13,20 gld.

**Sferoj-2; Sciencfikcio kaj fantastio**, div. aŭtoroj. Div. tradukistoj. Komp. M. Guiterrez Aduriz. Santander: la kompilinto, 1983. 145p. Ilus. 19cm. ISBN 84 300 9632 9. Dek tri sciencfikciaj rakontoj el diversaj lingvoj; kun same altnivela grafika prezento kiel la unua volumo. Prezo: 18,00 gld.

**Skandalo pro Jozefo, La**, Valdemar Vinař (1918-1981). Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1981. 68p. Ilus. Mimeo. 21cm. Originala romano bazita sur okazaĵo en antikva Egiptio, rakontita en la unua libro de la Biblio, Genezo. Prezo: 6,60 gld.

**Skizoj pri la historio de bulgara Esperanto-movado**, kunmetis Dimitr Papazov. Sofia: Bulgara Esperantista Asocio, 1982. 143p. Ilus. Mimeo. 20cm. Traktas la historion de 1907 ĝis 1982. Prezo: 10,80 guldenoj.

**19aj kaj 20aj Internaciaj Floraj Ludoj; Suplemento de "Kataluna esperantisto", La (N-ro 1)**, red. G. Mora i Arana. Barcelona: Kataluna Esperanto-Asocio, 1982. 43p. Ilus. Premiitaj literaturaĵoj el 1979 kaj 1980. Prezo: 4,80 guldenoj.

**Sur kampo granita**, István Nemere (1944). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 127p. 20cm. ISBN 963 571 120 9. Romano de jam bone konata Esperanta verkisto; bazita sur vera okazaĵo, kiam oni malkovris, ke katolika episkopo estis krimulo de la Dua Mondmilito. Prezo: 15,00 gld.

**Taskfolioj por komencantoj**, komp. Helena kaj Jozefo Mikulaš. Sen bibliografiaj indikoj: 1983. 33p. Ilus. Mimeo. 28cm. Kolektaĵo de ekzercoj kun ilustraĵoj por iu ajn Esperanto-kurso. Prezo: 6,00 guldenoj.

**Universal Languages and Scientific Taxonomy in the Seventeenth Century**, M.M. Slaughter. Cambridge: Cambridge University Press, 1982. 277p. 24cm. Bind. ISBN 0 521 24477 3. Anglalingva akademika traktaĵo pri projektoj de universala lingvo el la 17a jarcento kaj ties sociaj kaŭzoj (kvankam ne pri la laboro de Leibnitz). Prezo: 123,00 guldenoj.

**Unuaj pioniroj de Esperanto-movado en Bulgario**, Boris Nedkov. Sofia: Bulgara Esperantista Asocio, 1982. 39p. Ilus. Mimeo. 20cm. Biografietoj pri la plej fruaj esperantistoj en Bulgario. Prezo: 4,20 guldenoj.

**Vilaĝo Borovo**, Krum Velkov. El la bulgara trad. Asen Grigorov. Budapest (ne indikita): Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 130p. 20cm. ISBN 969 571 115 8. Romano pri okazaĵoj en bulgara vilaĝo okaze de la ribelo en 1923. Prezo: 12,00 gld.

**Viveroj** (1934), Alfonso Rodríguez Castela (1886-1950). El la galega trad. F. de Diego (1934). Santiago de Compostela: Esperanto-Kurso, 1983. 41p. Ilus. 22cm. ISBN 84 300 9126 2. Traduko de *Retrincos*, unu el la grandaj titoloj de la galega literaturo. Prezo: 3,60 gld.

**Vortaro de Esperanto kaj svahila**, Jan Knappert. Rotterdam: UEA, 1983. 130p. 18cm. ISBN 92 9017 027 1. Dudirekta poŝvortaro kun Esperanta skizo pri la svahila kaj svahillingva skizeto pri la baza gramatiko de Esperanto. Prezo: 13,50 gld.

**Zamenhof – Movado – Doktrino**. Warszawa: Esplorleriga Centro de Pola Esperanto-Asocio, 1983. 124p. Mimeo. 20cm. Tri eseoj: *Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto* de Ryszard Kraŝko, *Sociologia karakterizo de la Esperanto-movado* de Jerzy Leyk kaj *Doktrino de Zamenhof* de Walter Ŝelazny. Prezo: 10,50 gld.

**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20%, por la mendoj super 200 guldenoj – 10%. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!**



**HERBERT W. ALLEN-SMITH (1896-1983)** mortis la 6an de julio en Watford, Britio. Li estis dumviva membro de UEA kaj veterano de la brita Movado. Li lernis Esperanton dekunu-jara kaj ĉeestis la 3an Universalan Kongreson en Kembriĝo, 1907.

**HORACE BARKS (1895-1983)**, iama lord-urbestro de Stoke-on-Trent, Britio, kaj ricevinto de la brita ordeno OBE, forpasis la 27an de julio. Li dum preskaŭ kvardek jaroj aktivis por Esperanto, i.a. kiel fervojisto en Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Malgraŭ okupiteco en la loka socia vivo, Esperanto ĉiam estis por li ĉefa intereso. Li estis la delegito en Stoke-on-Trent kaj fakdelegito por turismo kaj urbaj aferoj. Oni nomis lokan konsultan bibliotekon honore al Horace Barks.

**ALEŠ BERKA (1909-1983)**, teknikisto kaj la delegito en Vsetín, Ĉeĥoslovakio, mortis la 5an de julio.

**GUIDO BILLET** forpasis antaŭ nelonge en Viareggio, Italio, kie li estis la delegito kaj fakdelegito pri grafologio. Li estis membro de UEA de post 1956.

**GIUSEPPE CARASSA (1885-1982)**, antaŭe delegito en Castellazzo Bormida, Italio, forpasis la 27an de decembro pasintjare.

**JACKY DUMAS (1932-1983)**, kuraĉisto, mortis antaŭ nelonge en St.-Etienne, Francio. Li tie funkciis kiel la delegito kaj fakdelegito pri medicino. Li estis membro de UEA ekde 1954.

**ETHEL EDMONDSON (1900-1983)** forpasis la 16an de majo en Keighley, Britio. Ŝi lernis Esperanton en 1928 kaj aparte aktivis en la loka Movado. Ŝi estis membro de UEA de post 1951.

**HARALD FINGALSSON (1916-1983)**, la delegito en Jönköping, Svedio, forpasis la 31an de julio ĉi-jare.

**CARLITA HUETER (1898-1983)** mortis la 1-an de julio en Clermont-Ferrand, Francio. Ŝi lernis Esperanton en 1953 kaj frue ekinstruis ĝin. De la posta jaro ŝi daŭre funkciis kiel fakdelegito pri turismo kaj komerco por Clermont-Ferrand. Ŝi estis monde konata pro sia atenta kaj akurata prizorgo de Kores-

ponda Servo Mondskala, kiun ŝi transprenis kiel servon de UEA jam en 1960. En 1980 UEA elektis ŝin kiel Honoran Membron.

**GABI JOBBA (1947-1983)** mortis la 27an de aŭgusto en Budapeŝto, Hungario. Ŝi estis fama kaj populara hungara aktorino, kiu plurfoje rolis en Esperanto. Pro sia malsaniĝo ŝi ne povis prezenti en la UK en Budapeŝto kiel ŝi intencis.

**NIKOLA KNEŽEVIĆ (1960-1983)** mortis la 22an de aŭgusto en Osijek, Jugoslavio. Li estis tre aktiva membro de la loka Esperanto-societo, kun pluraj oficialaj funkcioj.



**Gabi Jobba estis elstara membro de la Hungara Esperanto-Teatro.**

**RAJNA KONSTANTINOVA** el Sofio, Bulgario, forpasis la 15an de aŭgusto en Budapeŝto. Ŝi konatiĝis sur la kampo de literaturo. Ŝi gajnis en la Belartaj Konkursoj la pokalon Harabaĝiu pro nova talento en 1979 kaj la unuan premion de la 22aj Internaciaj Floraj Ludoj en Hispanio.

**LIBOR KŘIVÁNEK (1926-1983)**, la fakdelegito pri turismo en Písek, Ĉeĥoslovakio, mortis antaŭ nelonge. Li estis membro de UEA de post 1956.

**JAN MOLNÁR**, multjara membro de UEA, forpasis antaŭ nelonge en Prago, Ĉeĥoslovakio.

**PAUL PUVREZ**, antaŭe loĝanta en Kanado, mortis antaŭ nelonge en Genval, Belgio.

**JOHANO ROATTINO (1910-1983)**, instruisto, verkisto kaj tradukisto, mortis antaŭ nelonge en Vicoforte Mondovi, Italio.

**RONALD E. WARD (1928-1983)**, ŝtato-ficisto, mortis la 1-an de majo en Bexleyheath, Britio. Li estis dumviva membro de UEA kaj Brita Esperanto-Asocio. Dum multaj jaroj li agis kiel komitatano de Londona Esperanto-Klubo.

**WILHELM WINGEN (1895-1983)**, fama Esperanto-instruisto, mortis en Bergisch-Gladbach, FR Germanio, la 11an de aŭgusto. Li lernis Esperanton en

(Foto: Zoltán Fejér)



● **Eŭropo:** Laŭ privata iniciato de esperantistoj, laborantaj ĉe la Eŭropa Komisiono, de la 28a de majo ĝis la 12a de junio okazis en Windischgarsten, Aŭstrio, unusemajna Esperanto-kurso kun dua semajno da praktikado, ekskursoj, invitoj ks. por funkciuloj de la Komisiono. Dek funkciuloj partoprenis kun kvin aliaj. Oni raportis pri entuziasmo ĉe la partoprenantoj, post kiam ili rapide atingis kontentigajn rezultojn en mallonga tempo pro sia antaŭa kono de kelkaj lingvoj. En la urbeto Windischgarsten la kurso donis grandan informan reeĥon.

● **Hispanio:** En la kataluna urbo Sabadell, apud Barcelono, kie tradicie viglas la loka Esperanto-movado, unuafoje du esperantistoj, s-roj Sebastià Ribes i Garolera kaj Isidre Creus i Virgili, estas kulturaj konsilantoj de la urba estraro.

● **Malto:** Multaj esperantistoj sukcese utiligis sian partoprenon en la budapeŝta Universala Kongreso por enlanda informado. Kaj la televido kaj la radio raportis pri la Kongreso. Krome, la 14an de septembro la malta radio elsendis duonhoran programon pri Esperanto.

● **Esperanto-Societo (Malto),** kvankam malgranda, nun akiris sian propran sidejon, Esperanto-Domo, en la ĉefurbo Valetto.

● **Nederlando:** La 15an de oktobro nederlandaj esperantistoj memorigis per solenaĵo la 50-jaran ekziston de la Esperanto-monumento en Bergen-op-Zoom. Raportis du ĵurnaloj.

● **Pacifiko:** Laŭ anonco de la Loka Kongresa Komitato, la 3a Pacifika Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Portland, Oregono, Usono, sur la tereno de la Universitato de Portland de la 14a ĝis la 19a de julio venontjare. Preleganto por la malfermo estos s-ro Ralph Harry, multjara ambasadoro de Aŭstralio. La celo de la serio de kongresoj estas pri-trakti problemojn kaj interesojn, kiuj estas specifaj al la pacifika regiono. La 1-a Pacifika Kongreso okazis en 1976 en Aŭstralio, la 2a en Kanado en 1980. Pliajn informojn oni petu de s-ro Jim Deer, 11950 SW Settler Way, Beaverton OR 97005, Usono.

● **Soveta Unio:** De la 17a ĝis la 28a de aŭgusto okazis la Okcidenta Sovetia

Esperantista Junulara Tendaro en turisma centro apud Kujbiŝev, ĉe la bordo de la rivero Volgo. La aranĝon partoprenis 245 homoj el dek sovetiaj respublikoj. Krom diversnivelaĵoj kursoj, oni prezentis riĉan kulturan, sciencan kaj literaturan programojn.



● **Kanado:** Kiel konate, lastatempe en multaj landoj tra la tuta mondo okazas plej diversaj pacmanifestacioj. Ankaŭ esperantistoj partoprenas ilin, kvankam tio okazas plejofte neorganizite. Alie tamen estis antaŭ kelkaj monatoj en Vankuvero, nia venontjara kongresa urbo. Kvankam ili estis relative malgranda grupo en la 66 000-persona manifestacio, la lokaj esperantistoj venis al la aranĝo kun la plej granda slogano, kaj la ĝenerala atento ne povis maltrafi ĝin. En Vankuvero oni asertas, ke tie neniam antaŭe okazis io simila pri la Esperanto-informado.



● **Ĉinio:** La 4an de septembro la Esperanto-societo en Hangzhou okazigis informan kunvenon, en kiu prelegis vicprofesoro Lü Moje. Poste oni fondis novan kurson de Esperanto, en kiu partoprenas 200 lernantoj: laboristoj, studentoj kaj inĝenieroj.



● **Brajla literaturo:** Por la bezonoj de la blindaj esperantistoj en Soveta Unio ĉi-jare aperos brajla eldono de *Esperanta-rusa vortaro* de E.A. Bokarev. Tiu renoma leksikologia verko unue aperis en 1974 (en la eldonkvanto de 40 000 ekzempleroj) kaj represiĝis pasintjare (en 100 000 ekzempleroj; havebla ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 15,00 gld.). La brajla eldono aperos ĉe la moskva eldonejo "Prosveŝĉenije" (Klerigo), kiu en la lastaj jaroj jam eldonis du aliajn Esperantajn librojn en la brajla skribo.

● **Esperantologio:** La 31an de majo 1983, en la Lingvosciencia Instituto de la Scienca Akademio de Soveta Unio en Moskvo, okazis sukcesa defendo de universitata disertacio pri Esperanto. Temis pri la laboro de Dina Grigorjevna Lukjanec, kiu verkis pri: "Lingvistika analizo de la esprimrimedoj de la poezia parolo (laŭ materialo en Esperanto kaj la franca lingvo)". La kandidatino komencis sian esplorklaboron jam sub la gvido de prof. E.A. Bokarev (1904-1971), por daŭrigi kaj fini ĉe prof. M.I. Isajev. La disertacio plian fojon atentigis pri la granda esprimpotencialo de Esperanto.

● **Jubileoj:** La unua Esperanto-grupo en la mondo festos sian 95-jaran ekziston la 12an de decembro ĉi-jare. Se vi iom konas la movadan historion, vi divenas, ke temas pri la grupo en la germana urbo Nürnberg, kiu ankaŭ alimaniere grave rolis en la unuaj jaroj de la historio de Esperanto. La adreso estas: Esperanto-Grupo, Pirckheimerstr. 11, D-8500 Nürnberg 10, FR Germanio.

● **Tradukoj:** En la nederlanda literatura revuo *De Tweede Ronde* (La dua

rondo), numero de aŭtuno 1983, aperis la 10-paĝa rakonto "Unu paĝeto en mia lerneja vivo" de Vasilj Eroŝenko. La rakonton el Esperanto en la nederlandan tradukis d-ro W.A. Verloren van Themaat.

● **Verkistoj:** La literatura Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio deziras prezenti al esperantista kaj neesperantista publikoj aŭtorojn, kiuj verkas en Esperanto. La Sekcio petas ĉiun seriozan verkanton sendi koncizan biografion, liston de verkoj, ĉu presitaj ĉu manuskriptaj, kun informoj pri persona literatura filozofio kaj eventualaj literaturaj premioj gajnitaj. Pliaj detaloj haveblas de: Literatura Sekcio de ĈEA, Počernická 333/86, CS-108 00 Praha 10, Ĉeĥoslovakio.

● **Literaturo:** La revuo *Franca esperantisto* pretigas bibliografion de ĉiuj literaturaj verkoj el la franca, tradukitaj Esperanten. La redaktoro danke ricevos informojn pri ĉiu tia verko, ĉu aperinta ĉu manuskripta: S-ro Hervé Gonin, 9

rue de l'Enclos, F-59151 Arleux, Francio. Krome, *Franca esperantisto* komencis eldoni serion da specialaj literaturaj numeroj. La unua, ĵus aperinta, enhavas la novelon de Prosper Mérimée *Lokis* el la pasinta jarcento. La sama revuo anoncis tradukkonkurson kun la limdato de la 31a de marto 1984. Temas pri tradukoj aŭ el la franca Esperanten aŭ el Esperanto francen. Regularon petu ĉe la ĉi-supra adreso.

● **Poezio:** Triesta Esperanto-Asocio (Italio) anoncis la rezultojn de sia Poezia Konkurso "Internacia Amikeco" 1983. La unuan premion gajnis s-ro Jorge Das Neves, Brazilo, pro sia poemo "Amikeco".

● **Eldonado:** UEA planas viciĝi inter la pli grandajn eldonejojn de la Esperanto-literaturo. Al tiuj planoj kontribuas ne nur la oficejoj en Antverpeno (Grafika Centro) kaj Budapeŝto (Sciencia Eldona Centro) sed ankaŭ pligrandigo de la fortoj en la Centra Oficejo en Roterdamo. Lastatempe tie eklaboris du oficistoj, kiuj ĉefe okupiĝas pri la eldonado, nome Geoffrey Sutton (Britio) kaj Karl Trimbom (FR Germanio).

## Persone

● **Kalocsay:** Okaze de la Universala Kongreso en Budapeŝto oni malfermis Memorĉambron en Abaujszántó, norda Hungario, omaĝe al la elstara eminentulo de la Esperanta literaturo d-ro Kálmán Kalocsay (1891-1976), kiu tie naskiĝis. En la ĉambro oni konservas liajn personajn objektojn, kiel skribtablon, kaj ekzemplerojn de liaj verkoj kaj tradukoj. La loka klubo danke ricevos ĉiujn aĵojn pri Kalocsay, por riĉigi la historian

postlasaĵon: S-ro László Molnár, Sek. de la Esperanto-Klubo "D-ro Kálmán Kalocsay", Kassai ut 20, H-3881 Abaujszántó, Hungario.

● **Miyamoto:** Okaze de la 70a Kongreso de Japanaj Esperantistoj en Kameoka, Japana Esperanto-Instituto je la 6a de aŭgusto speciale honoris la konatan Esperantan verkiston, Masao Miyamoto, pro lia dekjara laboro super la granda *Vortaro Esperanto-japana*, kiu ĵus aperis.

● **Wandel:** Survoje al la Internacia Junulara Kongreso en Debrecen d-ro Amri Wandel, la tiama prezidanto de TEJO, vizitis Rumanion, specife por kontakti Esperanto-grupojn en Bukareŝto kaj Timiŝoara. En Timiŝoara li vizitis la Kolektivon Esperanto-Interlingvistiko. Kvindek studentoj ĉeestis prelegon de d-ro Wandel pri Esperanto. En Bukareŝto, kie ĵus finiĝis Esperanto-kurso kun 20 studentoj, li renkontis plurajn gejunulojn. Pri la vizito mallonge raportis la loka ĵurnalo *Neue Banater Zeitung*.


## Reklami Esperanton kaj la Kongreson!

Aperis bela dukolora (verdo kaj ruĝo) glumarko pri la 69a UK en Vankuvero. Ĝi estas ronda (diametro: 37 mm), memglua, kun amaso da lerte plektitaj detaloj: verda stelo, acerfolio (simbolo de Kanado), mondmapo, kongresaj nomo kaj dato. Prezo por 100 ekz. (minimuma mendokvanto): 11,40 (por Nederlando 13,45) guldenoj, inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.





tibor sekelj



elpafu la sagon

uea 1983

Aperis nova volumo en la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA. Temas multrilate pri unika verko, kiu mankas al la plimulto de la naciaj lingvoj:

**Tibor Sekelj**

## ELPAFU LA SAGON

el la buŝa poezio de la mondo

**Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1983. 187 paĝoj, 21cm. Prezo: 27,00 gld. (broŝurita); 36,00 gld. (tole bindita), plus sendokostoj. Kutima triona rabato ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe la libroservo de UEA.**

## Oficiala Informilo

### POŝTA STRIKO EN NEDERLANDO

Jam tri semajnojn, ekde la 7a de novembro, okazas striko de la nederlanda poŝto. Tio signifas, ke la Centran Oficejon atingas neniuj eliaj leteroj. Eblas kontaktoj tra la Grafika Centro en Antverpeno aŭ telefonvokoj.

### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: G. Gerritse; J.H.J. Keller.

### DONACIOJ 1983 (Gld.)

ĝis la 10a de novembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: K. Hata 71,00; G. Pirlot 60,89. Japanio: H. Gotoo 102,72. Nederlando: J.S. Rooke 300,00. Svedio: D. Sandström 18,83; Yngve Nilsson 18,85. Usono: anonima 71,64; Scott S. Smith 71,65; J. Veit 71,65; E. Hedges 22,71. Sumo ĉi-jara 9 378,22.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: Frisa Esperantista Rondo 45,00; J.S. Rooke 300,00. Sumo ĉi-jara 3 945,23.

ĜENERALA KASO: Belgio: Germaine Wolff 1 000,00. Britio: Ch.A. Field 22,07. Svislando: Lena Grütter 62,46. Usono: Alex Tate 1 000,00. Diversaj malgrandaj 72,12. Sumo ĉi-jara 5 785,63.

FONDAĴO KER DE TEJO: Francio: Eŭropa Junulara Fondaĵo 13 208,70. Sumo ĉi-jara 19 045,94.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J. v.d. Teems 10,00. Sumo ĉi-jara 200,00 guldenoj.


FONDAĴO TEJO: Nederlando: J.S. Rooke 300,00. Sumo ĉi-jara 509,52.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: S-ino R. Paintner 1 120,33. Usono: Scott S. Smith 71,65. Sumo ĉi-jara 5689,80.

### NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Brazilo: Francisco de Souza Almada; Marija Pozder Almada. FR Germanio: Reinhard Selten; Ruth Paintner-Trumpp. Usono: Thomas H. Goodman. SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Usono: Charlotte Kohrs; Pauline Ledeen. AMIKOJ (minimumo \$10): Belgio: Germain Pirlot. FR Germanio: Hans Georg Strauss; Holm Sörensen. Jamajko: Arpad Ronai. Usono: M. kaj H. Leonard.

**Al ĉiuj tre koran dankon! UEA**



*Jus aperis anglalingva raporto de la nederlanda firmao BSO, kiu okupiĝas pri Esperanto kiel pontolingvo en aŭtomata tradukado: **Distributed language translation: feasibility study of a multilingual facility for videotex information networks** de A.P.M. Witkam, 1983, 370p., 30cm. Speciala prezo por la E-movado: 57,50 gld. plus sendokostoj (normala librovendeja prezo estas 127,50 gld).*



# Anoncetoj

**Tarifo:** ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

**Se vi regas malofte parolatan lingvon,** bv. kunlabori je traduko de Esperanto-informilo. Mi eldonos samajn faldfoliojn en kiel eble plej multaj lingvoj. Por ricevi la Esperantan kaj anglan versiojn kun detalaj klarigoj pri la traduktasko skribu al: Esperanto, Bailieboro, Ontario, Kanado. K0L 1B0.

**Ĉiu serioza esperantisto** legu la gravan verkaĵon *Por multoble pli-vastigi nian movadon*. Prezo: 22 fr. frankoj aŭ 8 poŝtaj kuponoj. Adreso: Ligue "Pro Unesco", 24 ave. de Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris. – Sama adreso: La sukcesaj *Facilaj dialogoj* kiel la famaj *Amuzaj dialogoj*. Prezo: 29 fr. frankoj.

**23-jara studento** deziras korespondi kun gekorespondantoj tutmonde pri ĉiuj temoj. Abdul Aziz Arhari, P.O. Box 114, Mahabad, West Azarbayjan, Irano.

**34-jara oficistino** deziras korespondi tutmonde. F. Faraĝi, Apt.8 No.3 Kh.20, Amirabad Shomali, Tehran 14399, Irano.

**Irana studentino**, komencanto, serĉas korespondantojn tutmonde. Skribu al f-ino Afsaneh-nosleh, Tehran-vila str. 12 West. No. 32, Tehran 14448, Irano.

**Malkovru Kanadon.** Okaze de la 69a UK, estos organizita karavano de Montrealo ĝis Vankuvero dum julio 1984. Por pliaj informoj skribu al s-ro D. Novakovic, P.O. Box 334, Delson, Qué., J0L 1G0, Kanado.

**Esperanto-klubo Interklubo Pardubice** aranĝos letervesperon fine de novembro 1983. Viajn salutojn kaj korespondetojn atendas grupo de 30 komencantoj kaj progresintoj, el kiuj dek estas 9- ĝis 10-jaraj gelernantoj. Ĉiu sendaĵo estos respondita. Skribu al: Václav Pithardt, CS-530 03 Pardubice, Dašicka 1217, Ĉeĥoslovakio.

**Dermod Quirke** (delegito, Britio/Wandsworth) kaj Brian Holser sciigas novan adreson tuj validan: 6 Linton Close, Newark, Nottinghamshire, Britio NG24 4TQ. Novaj korespondantoj ne serĉataj!

**Aĉetu la diskon (aŭ kasedon) Karnavaleto**, por vi aŭ por donaci, ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk: 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkuponon la deziratan objekton. Prezo (sendkostoj inkluzivitaj): disko 24 sv. fr.; kasedo 20 sv.fr. (*Tra l'mondo elĉerpigis*).

**Urantia revelacio:** pri tiu temo deziras korespondi Frederick Nietert, POB 1132 Douglas, AZ 85607, Usono.

**Studi matene, ferii posttagmeze**, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando)! Petu informilon!

**14-jara knabino** deziras korespondi tutmonde, aparte kun latinamerikaj geknaboj. Kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn pri bestoj kaj fremdaj landoj. Interesiĝas pri filmoj kaj aktoroj. Katrin Blanke, Rosenthalerstr. 2, DDR-1054 Berlin, Germana DR.

**Gekorespondantojn 10- ĝis 13-jarajn** serĉas instruisto por siaj kursanoj. Kontakto s-ron Trimborn, Josefstr. 23, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

**29-jara sekretariino** serĉas gekorespondantojn el Germanio, Aŭstrio, Nederlando, Italio aŭ aliaj landoj. Ĉiuj temoj ŝatataj. F-ino Annie Vanwallegem, 38, rue des trois visages, F-62000 Arras, Francio.

**Fakuloj pri sporto**, bv. kunlabori kun Esperanto-grupo, kiu preparas informlibreton por la Vintraj Olimpikoj en Kanado en 1988: s-ino D.W. Hawley, 3019 Hampton Crescent, Alberta T3E 4R1, Kanado.

**Jarlibro 1984** havas la limdaton de la 1-a de januaro 1984. Se delegito volas korekti la informojn pri si, se membro volas iĝi delegito, se oni volas mendi anoncon en la Jarlibro, jam estas tempo agi! Kontaktigu kun via Ĉefdelegito.

**30-jara Esperanto-klubo** aganta en indifera medio petas helpon por veki intereson, montrante la taŭgecon kaj universalecon de Esperanto. Okaze de la centjariĝo de la urbo Venado Tuerto, la 26-an de aprilo 1984, bv. sendi salutojn, poŝtkartojn, bildkartojn, desegnaĵojn, broŝurojn, revuojn kaj ĉion eblan por ekspozicio al: Comisión Festejos Centenario, Palacio Municipal, San Martín 899, 2600 Venado Tuerto, Argentino.

## Estraro de TEJO: nomoj, fakoj, adresoj

Kiel anoncite jam en nia septembra numero, la junulara sekcio de UEA ŝanĝis sian estraron dum la 39a Internacia Junulara Kongreso en Debrecen. Ĉar TEJO-rubriko mankis en niaj lastaj numeroj, jen ĉi-sekve la kompleta adresaro de tiu estraro, por la bezonoj de la TEJO-aktivuloj.

**Prezidanto, planado:** Ian Jackson, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London, Britio w11 4UF.

**Unua vicprezidanto, eksteraj rilatoj:** Martin Haase, Weidenpescherstr. 18, D-5000 Köln 60 (aŭ Kiebitzweg 9, D-4600 Dortmund 50), FR Germanio.

**Dua vicprezidanto, scienca kaj faka agado:** Zsófia Kóródy Barossné, Laborc kör 44, H-1037 Budapest, Hungario.

**Ĝenerala sekretario, eldonaĵoj, servoj:** Norberto Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna, Italio.

**Edukado de gvidantoj:** Jan Koszmaluk, ul. Okopowa 43/144, PL 01-059 Warszawa, Pollando.

**Landa agado ekster Eŭropo:** Neven Kovačić, Gorice 67, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

**Kasisto:** André Staes, p/a Esperanto-Centro, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

**Landa agado en Eŭropo:** Marie Vančurová, Palackého 153, CS-289 03 Městeč Kralové, Ĉeĥoslovakio.



# Eldonejo - librejo SONORILO

- **L'espéranto dans l'enseignement:** d-ro Pol Denoël. 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. 100 BF.
- **Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. 180 BF.
- **Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj,** kun surprisitaj stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakajoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj: 145 BF.
- **Gluaĵo: Internacia Lingvo Esperanto,** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 x 17 cm. 25 BF.
- **Novjaraj gratulkartoj:** kvar diversaj koloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj. Dua eldono. 60 BF.
- **Leksikono de Bovy:** J.P. Bovy. Herstal: APE, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortareto en kvin lingvoj (Esperanto, angla, franca, nederlanda, germana). 240 BF.
- **Eldonejo-Librejo SONORILO** estas peranto de: *Budapeŝta informilo, El popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Monato, Norvega esperantisto, Oomoto.* Petu abonprezojn en via nacia valuto.
- **De la 5a de okt. 1983 ĝis la 1-a de marto 1984** nia Librejo aŭtomate donas rabaton de 5%, se via mendo superas la valoron de 500 BF (ekskluzive la sendokostojn). Ni vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromarkato. Al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: 20% por la mendo sub la valoro de 1800 BF, kaj 10% por la mendoj de pli granda valoro. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima landa liveranto aŭ rekte ĉe:

**Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22,  
B-2610 Wilrijk (Antwerpen)  
Belgio. ☎ (03) 827 24 05.**

**Ni estas konataj pro malaltaj prezoj kaj rapida servo!**

Multaj homoj pretus nun preskaŭ per oro pagi la unuajn tri esearojn de Waringhien, sed ili estas elvenditaj kaj nehaveblaj. Tio baldaŭ okazos ankaŭ al ĉi tiuj du verkoj:

## 1887 kaj la sekvo... (Eseoj IV)

## Kaj la ceter' - nur literaturo (Eseoj V)

Indas do rapidi kaj mendi siajn ekzemplerojn ĉe la eldonejo aŭ ĉe via kutima libroservo!

**1887 kaj la sekvo...; Esperantologiaj eseoj 4,** Gaston Waringhien (1901). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1980. 300p. 21 cm. ISBN 90 6336 013 4. Dek ses eseoj, pri la historio kaj estonteco de Esperanto kaj pri la personeco de ĝia kreinto. Prezo: 495 belgaj frankoj.

**Kaj la ceter' - nur literaturo,** G. Waringhien. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1983. 350p. 21cm. Esperantologiaj eseoj 5. ISBN 90 6336 031 2. La kvina volumo de eseoj pri literaturo, literaturistoj, tradukado, arto k.a. Prezo: 700 belgaj frankoj.



TK/Stafeto, Miksebaan 65A,  
B-2130 Brasschaat, Belgio.  
Poŝtĉekkonto Bruselo:  
000-02422856-33.  
Aldonu 10% por afranko.

# HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO  
**De 63 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo**

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 15,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (33,00 guldenoj; por Nederlando 34,32 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo  
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska



# NUDPIEDA GEN

La fama kontraŭmilita bildstria romano en mirinde flua esperanta traduko kaj bonega teknika prizorgo.

*Nudpieda Gen* (1973), Keizi Nakazawa (1929). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1982. 4+284 p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld., plus sendokostoj. Mendebla ĉe: UEA, JEI, KLEG.

En la ĉi-jaraj belartaj konkursoj de UEA, la verko estas premiita kiel "Infanlibro de la Jaro 1982".



## DONU MONON NUR AL TIUJ, KIUJ NE BEZONAS ĜIN!

Ĉi tiu malnova saĝaĵo – konata en la financaj medioj – validas ankaŭ por ni, kaj ni aplikas ĝin al tiuj, kiujn ni subvencias. Ni ne bezonas monon por ni, ĉar ni estas Institucio Hodler '68 – la plej granda mecenato en la Movado. Ni jam disdonis 100 000 guldenojn por pluraj Esperantaj projektoj. Por plivastigi nian agadon, ni petas vin helpi la Movadon pere de ni. Vi povas helpi per senrentaj pruntoj je ses jaroj aŭ per pruntoj je dek jaroj kun 2-procenta rento.




Per la rentodiferenco ni kunhelpas agantojn produkti esperantistojn, kaj intertempe ni gardas vian kapitalon por vi, en la stabila nederlanda guldeno.

Kontaktu nin pere de la Centra Oficejo de UEA aŭ skribu al la adreso de nia administranto:

Hans Bakker, Kastelenstraat 231,  
1082 EG Amsterdam, Nederlando.

▷ **INSTITUCIO HODLER '68** ◁



Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

## Ne travivu jaron sen *Monato*

*Julie Winberg*

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondokuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).

